Sándor Petőfi

Tigro kaj Hieno

Dramo en kvar aktoj

Sándor Petőfi

Tigro kaj hieno

Historia dramo en kvar aktoj

Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2026

Originala titolo: Tigris és hiéna
Eldonis: Emich Gusztás, 1847

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio, 2026

Titolpaĝo: Jozefo Horvath helpe de AI Gemini

ISBN 978-963-571-552-7

CC BY-NC-ND

e-libro HEA

Personoj

Boriso
Predslava
Judito
Milutin
Adalberto la 2a
Heleno
Géza
Ladislao
Sülülü
Ŝimŝono
Saŭlo
Dengez
Teodoro
Vas
Göndör
Baját
Zsember
Rád
Gedő
Korog
Bial
Beghel
Provoso
Servisto
Baronoj, nobeloj, kortegaj damoj

*Okazas en Galicio kaj Hungario en 113**

UNUA AKTO

Unua sceno

Sovaĝa arbaro

Boriso, *Saŭlo*

Saŭlo *(dormas surtere; lia kapo ripozas sur plata rokopeco)*.

Boriso *(enprofundiĝinte en siaj pensoj, iras tra la scenejo; stumblas je Saŭlo)*: Kiu estas tiu? Kiu vi estas?

Saŭlo *(vekiĝas)*: Ĉu mi? Fuĝanto sen tero kaj tegmento. Kaj vi?

Boriso: Ĉu mi? La duko de la tero, sur kiu vi kuŝas!

Saŭlo: Alifoje iru sur viaj propraj piedoj kaj ne ĝenu mian dormon! Mi ja povas nur malofte dormi.

Boriso: Ej, vi fripono, ĉu vi surdas?

Saŭlo: Ne.

Boriso: Ĉu vi aŭdis, kion mi diris, kiu mi estas?

Saŭlo: Mi aŭdis.

Boriso: Kaj tamen vi aŭdacas paroli kun mi tiel desupre, kvazaŭ mi estus via kompano, he?

Saŭlo: Se vi ne estas tio, vi ankoraŭ povas fariĝi. *(Stariĝas.)* Sed nun ankaŭ mi havas kelkajn vortojn al vi, duko de Galicio, vi nomis min fripono.

Boriso: Tio vi estas, fripono!

Saŭlo: Kaj mi diras, ke diras tion al mi fripono.

Boriso: Ha, mizera vermo! *(Levas sian glavon kaj ĵetas sin sur Saŭlon.)*

Saŭlo *(same levas sian glavon kaj elbatas tiun de Boriso el lia mano)*: Estis vane malingi ĝin. Alifoje enpugnigu ĝin pli brave!

Boriso: Homo! Ĉu vi estas diablo?

Saŭlo: Aŭ unu, aŭ la alia. Ambaŭ mi ja ne povas esti samtempe.

Boriso: Aŭdu, he!

Saŭlo: Mi aŭdas.

Boriso: Vi komencas plaĉi al mi.

Saŭlo: Ĉu vere?

Boriso: Vere! Donu vian dekstran manon!

Saŭlo: Estas bone, ke vi ne petas ion alian. Tion mi povas fari.

Boriso: Do diru, kiu vi propre estas?

Saŭlo: Kiel mi perceptas, ne mi surdas, sed vi. Mi ja diris: fuĝanto sen tero kaj tegmento.

Boriso: Kie estas via hejmlando?

Saŭlo: Kie estas la hejmlando de iu sen tero kaj tegmento? Simplamensa demando.

Boriso: Ne estus harfenda. Kie vi naskiĝis?

Saŭlo: Do tiel! Kie mi naskiĝis? Tie, kie antaŭ nelonge regis Kolomano la Libra, kiu estis la patro de la nuna duko de Galicio. Se tio veras.

Boriso: Hm, vi same hakas per glavo kiel per lango.

Saŭlo: Mi lernis hakadon de la sorto, kiu min jam dishakis en mil pecojn.

Boriso: Kaj kial vi forlasis vian hejmlandon, la belan Hungarion?

Saŭlo: Ĝi elvomis min.

Boriso: Ĉu vi estas ekzilita?

Saŭlo: Okazis ne alie.

Boriso: Kial?

Saŭlo: Nur.

Boriso: Estu sincera! Vi interesas min, vi estas missorta kaj krome mia samlandano. Parolu!

Saŭlo: Mi ne parolos.

Boriso: Kial ne?

Saŭlo: Kiom utilas, se mi parolas?

Boriso: Kiu scias? Se nenio alia, via koro plifaciliĝos, se ĝian doloron vi dividas kun kunsenta koro.

Saŭlo: Mi estas nek infano, nek virino. Mi ne bezonas plendi pri mia sorto al aliuloj. Kano knaras sub pasero, fluginta sur ĝin; Karpatoj mute tenas la peziĝantan ĉielon.

Boriso: Mi aprezas vin, brava viro. Mi ne plu instigas vin paroli pri via sorto; sed parolu tamen pri Hungario, kiu estas mia naskotero, kaj kiun mi tial amas!

Saŭlo *(flanken)*: Mi ja kredas; kiel aglo kolombon. Vi ŝatus profundigu en ĝin viajn dek ungojn.

Boriso: Nu? Ĉu vi silentas? Ĉu ankaŭ pri ĝi vi ne volas paroli?

Saŭlo: Jes ja! Pri ĝi volonte, se necesas. Sed vi scias, kiam al oni enkapiĝas la propra hejmlando, el kiu li estas ekzilita, li facile meditas, profundiĝas en pensoj. Cetere jam longe tempas, ke mi forlasis Hungarion, kaj de tiam ne multe mi aŭdis pri ĝi; kaj kio tiam okazis, ne plu estas novaĵo, kaj supozeble ankaŭ vi scias. Kaj cetere, kion mi povus scii, kio vin interesas? Mi havis ne multajn zorgojn pri publikaj aferoj, mi estas tre malgrava homo en mia hejmlando.

Boriso: Pri tio mi jam diras, ke vi mensogas.

Saŭlo: Ej, sinjoro, al tio mi devus respondi per mia glavo, sed mi ne lacigas ankoraŭfoje vian dukan talion.

Boriso: Ĝuste via glavmanipula lerto konjektigas, ke vi estas ne ordinara homo de via hejmlando. Sed kial tuŝus min, kio vi estis, kio ne. Nur parolu pri via, nia hejmlando! Parolu, amiko, kiel statas Hungario? Ĉu ĝi estas feliĉa, post kiam la bona Stefano la 2a dormas per la sonĝoj de mortintoj?

Saŭlo *(flanken)*: La bona Stefano la 2a, ĉar vin li volis sia heredanto, ĉu?

Boriso: Nu, ĉu Hungario estas kontenta pri sia nova reĝo?

Saŭlo: Kial vi tiom ceremonias pri la afero? Mi jam preskaŭ komencas dubi: ĉu vi vere originas el hungara sango.

Boriso: Kial?

Saŭlo: Ĉu vi pensas, ke mi ne scias, al kio vi aludas? Vi demandas pri la feliĉo de la hejmlando, kaj vi volas elspioni…

Boriso: Kion do?

Saŭlo: Ĉu ne estus favora okazo enrompi…

Boriso: Ĉu mi?

Saŭlo: Kaj meti la hungaran kronon sur vian kapon.

Boriso: Povas esti.

Saŭlo: Sed tio jam apenaŭ eblas.

Boriso: Kial?

Saŭlo Nur pro tio, ke ĝi estas nun sur tre bona kapo.

Boriso: Ĉu do oni amas Adalberton?

Saŭlo: Oni amas lin.

Boriso: Ĉu Adalberton, la Blindan?

Saŭlo: Tiun, Adalberton, la blindigitan. Sed estas iu, kiu vidas anstataŭ li.

Boriso: Kaj kiu estas tiu?

Saŭlo: Heleno, la reĝedzino.

Boriso: Ĉu brava virino?

Saŭlo: Mi ja kredas tion.

Boriso: Ĉu bela?

Saŭlo: Jen tie lumas la suno. Enrigardu ĝin!

Boriso: Mi ne povas enrigardi.

Saŭlo: Kial?

Boriso: Ĉar ĝi blindigas min.

Saŭlo: Nu vidu, tia estas la reĝedzino!

Boriso: Hm, kia entuziasmo!

Saŭlo: Nu jes, fajro boligas eĉ glacion.

Boriso: Sed, ĉu vi scias, kion ni faru?

Saŭlo: Mi ne scias, ĝis vi diros

Boriso: Kien vi celas de ĉi tie?

Saŭlo: Kien? Estus malfacile diri. Mi avancas kiel rivero, en necertecon, kien mia sorto, la hazardo kondukas min.

Boriso: Venu kun mi!

Saŭlo: Ĉu kun vi?

Boriso: Estu mia gasto!

Saŭlo: Kial ne? Volonte. Ie mi ja devas esti; kaj kie ajn mi restadas, estas al mi egale. Do kien ni iru?

Boriso: Kien? Mi mem ne scias tiel senpere. Mi ĉasis kaj erariris de miaj kunuloj. La hungara krono enkapiĝis al mi, ĝin mi pelis, tio estas ĝi pelis min ĝis ĉi tie.

Saŭlo: Gardu vin! Tio signifas nenion bonan.

Boriso: Hahaha, superstiĉa ŝtipkapulo!

Saŭlo: Nu, nu!

Boriso *(ĉirkaŭrigardas)*: Aĥ, ĉu vi vidas sur tiu montopinto tiun solecan pinon? Venu tien! De tie videblas la flago sur la turo de mia kastelo, kiu orientos nin. Venu! *(ambaŭ for)*

Dua sceno

Kastelĉambrego

Milutin

Milutin *(enpaŝas kaj kuras al fenestro)*: Aĥ, damnita roko antaŭ miaj okuloj! *(Kuras al alia fenestro.)* Tie, tie ŝi venas! Dankon al vi, ho, Dio, ke vi kreis montojn, sur kiuj la homoj konstruis kastelojn. Aparte dankon al vi, ke ĉi tie la kastelmonto estas tiel kruta. Oni povas suprenveni

nur paŝante malrapide. Malrapide ŝi proksimiĝas. Des pli longe mi povas rigardi ŝin. Ho, se ĉi tiu monto nun komencus altiĝi, kaj altiĝus laŭgrade, kiel ŝi proksimiĝas, kaj tio daŭrus tiel, eĉ tra vivo eterna, por ke mi povu admiri ŝin senfine el la fenestro! Aĥ, ŝi jam paŝas ĉe la pordego! Ŝi envenis. Nun mi do povas eliri. *(ekiras lantpaŝe.)* Apenaŭ tenas miaj piedoj, kvazaŭ mondo peziĝus sur ili. Ja tuta mondo peziĝas sur ili, tiu de la amo. Ha, ŝi jam alvenis! *(Subite elsaltas tra pordo.)*

Tria sceno

Predslava, *Judito*

Predslava *(iras al la pordo, tra kiu Milutin elsaltis.)*: Milutin! Milutin!

Milutin *(revenas):* Ordonu, altmoŝta sinjorino!

Predslava: Alifoje pli bone kaŝu vin malantaŭ la fenestro, fileto, kiam vi kaŝrigardas la princinon; ĉar se tiel mi vidas vin, mi deviĝas kredi, ke vi enamiĝis al ŝi…

Milutin *(flanken):* Mi perdiĝis. Ŝi scias.

Predslava: Vi povas foriri, filo.

Milutin *(tremante riverencas kaj foriras).*

Judito *(kiu, enveninte, lasis sin fali sur seĝo kaj ne aŭdis, kion Predslava diris):* Hu, mi tre-tre laciĝis. Tiel kruta estas ĉi tiu monto.

Predslava: Kaj tiel multe vi kuradis. Tio ne decas.

Judito: Kial?

Predslava: Ĉar vi jam ne estas infano.

Judito: Jes ja, bopatrino, Dio gardu min, ne esti tio. Kaj mi klopodos resti tio ankaŭ ĝis mia morto, ĉar mi opinias: oni estas feliĉa nur tiel longe, ĝis onia humoro restas infana. Krome mi apenaŭ estas trans mia dek-sesa jaro.

Predslava: Sed vi jam estas edzino kaj dukedzino.

Judito: Kaj ĉu pro tio estas nedece al mi kuradi?

Predslava: Ne ja.

Judito: Mi ne komprenas vin, bopatrino.

Predslava: Kiel dukedzino decas teni la dignon de via rango.

Judito: Ne estu tiel severa! Ho, Dio, se ne konvenas al mia rango, ke mi kuradas en herbo por floroj kaj papilioj, tiam mi preferus ne esti dukedzino.

Predslava: Simplamensa infano, tiel malmulte vi aprezas la tronon.

Judito: Kaj vi, bopatrino, ĉu tiel alte vi taksas ĝin, ke vi opinias inda rezigni pro ĝi la plej belajn ĝojojn de la vivo.

Predslava: La plej bela ĝojo de la vivo estas la trono. Ho, la trono, ĉi tiu tera ĉielo, kaj la krono estas la suno de ĉi tiu ĉielregno. Sidi sur la trono kaj regi estas tera dieco.

Judito: Dio scias. mi preferas sidi en bele verda herbo ol sur trono kaj pli plaĉas al mi florkronon sur mia kapo ol kronon. Mi sentas nur la pezon de la krono, sed mi ĝuas la odorojn de la floroj. *(Kornoj sonas.)* Aĥ, la ĉasistoj. La duko. Dank' al Dio! Sed ne, mi ne ĝojas, sed koleros, jes, mi koleros.

Predslava: Kiun kaj kial?

Judito: Vian filon kaj tial, ke tiel ofte li lasas min sola. Ho, se li scius, kiel malfacile estas al mi apartiĝi de li, li certe ne ĉasus tiel multe. Diru do, ĉu estas bone de via filo, ke tiel ofte li lasas sola sian edzinon? Ne estas bone, ĉu? Mi eĉ imagi ne povas, kiel li povas amuziĝi, kiam li estas ne kun mi, kvankam eĉ unu minuto mia ne estas vere feliĉa, se mi ne povas vidi lin.

Predslava: Tio estas tre simpla. Vi amas lin.

Judito: Ho jes, jes!

Predslava: Kaj li ne amas vin.

Judito. Bopatrino, pro Dio…

Predslava: Li ne amas vin.

Judito: Ne faru min malfeliĉa, bopatrino kaj ne kalumniu vian filon!

Predslava: Li ne amas vin.

Judito: Diru kion ajn, nur tion ne, bopatrino! Mi estas malforta floro, la amo de via filo estas ĉiopova sunradio, kiu vivigas min. Se ĉi tiu suno ne radios sur min, mi mortos.

Predslava: Fola infano, vi ne mortos. Sur la ĉielo de amo estas ne unu suno sed sennombraj; ĉiu viro estas tio. Se unu forturnas sin, troviĝas alia.

Judito: Neniam, neniam! Kaj mi ne kredas viajn vortojn.

Predslava: Mi ankaŭ ne volas, ke vi kredu miajn vortojn, nur la agojn de via edzo.

Judito: Vi ne amas unu la alian kaj tial…

Predslava: Judito!

Judito: Ne, mi ne suspektas vin, patrino. Estis fieco supozi tion pri vi. Pardonu min, mi tre petas. Vidu, mi eĉ ne scias, kion mi diras, tiom konfuzis min ĉi tiu penso. Mi ne kredas ion alian, patrino, ke vi volis min nur elprovi. Ĉu ne, tion vi volis? Sed mi eltenas la provon. Ha, paŝoj! Tio estos li! *(Ekiras al la pordo sed revenas.)* Jes, mi ja koleros. Nu jes, se mi povus! *(Ekiras.)*

Kvara sceno

La antaŭaj, Boriso

Judito: Mia edzo, mia amo!

Boriso *(deĵetas sian armilon kaj iradas longpaŝe tien-reen)*.

Judito: Mia edzo!

Boriso: Nu?… Aĥ, ĉu vi, edzino? Bonan vesperon, bonan vesperon!

Predslava: Mia filo!

Boriso: Kion vi volas?

Predslava: Iom da respekto, se mi povas peti.

Boriso: Alifoje. Nun mi ne havas tempon.

Predslava: Ĉu vi ne havas tempon?

Boriso: Ne.

Predslava: Filo, kiu mi estas?

Boriso: Estus longe rakonti tion. Nun mi havas nek tempon, nek emon por tio.

Predslava: Sentaŭgulo!

Boriso: Silentu, virino!

Predslava: Estu malbenita!

Boriso: Ĉu vi scias, de kie mi elvenigis vin? El monaĥinejo. Ĉu vi scias, kien mi sendos vin, se vi ne silentiĝos? En monaĥinejon. Tie vi povos malbeni, kiom al vi plaĉas.

Predslava: Ha, vi infamia!

Judito: Ho, bopatrino, mi petas vin per ĉiuj sanktuloj, ne molestu, ne incitu lin... Vi ja scias... Venu, bopatrino, mi petas vin, venu... Ni lasu lin sola... Vi vidas, li estas nun mishumora, kaj sendube li havas kaŭzon, por esti tia. Venu, venu! Li resereniĝos kaj riparos sian bruskan konduton. Ni iru, bopatrino. *(for)*

Kvina sceno

La antaŭaj, Saŭlo

Saŭlo: Ej, sinjoro, ĉu tiel oni traktas la gaston ĉe vi, ke oni frapfermas la pordon antaŭ lia nazo kaj lasas lin ekstere staradi?

Boriso: Ho, pardonu min, mi vere forgesis pri vi. Patrino, ĉi tiu kavaliro estas mia gasto, akceptu lin bonkore!

Predslava *(kiu ĝis nun fikse rigardis Saŭlon):* Terura vizaĝo!

Saŭlo: Estu kore salutata, sinjorino!

Predslava *(kaŝe al Boriso):* Filo, filo!

Boriso: Nu?

Predslava: Kiu li estas?

Boriso: Mia gasto.

Predslava: Sed kiu li estas?

Boriso: Estas egale, kiu ajn, gravas, ke mia gasto.

Predslava: Ne estas egale. Al mi ne egale. Mi devas scii, kiu li estas.

Boriso: Mi mem ne scias.

Predslava *(paŝas al Saŭlo):* Kavaliro, se juĝi laŭ via vesto, vi estas hungaro.

Saŭlo: Tio mi estas, sinjorino.

Predslava: Kaj se juĝi laŭ via vizaĝo... – Aĥ, Dio mia, kion mi diru?! – Kavaliro, ĉu vi konas Ŝimŝonon, la...

Saŭlo *(mirante kaj incitite retropaŝas)*.

Predslava: Li estas tiu, mi ne trompiĝis. *(al Boriso)* Filo, forsendu ĉi tiun homon!

Boriso: Kial?

Predslava: Mi petas vin, forsendu lin!

Boriso: Sed kio trafis vin?

Predslava: Ne demandu, nur forigu lin de antaŭ miaj okuloj. Mi petas, trudas vin!

Boriso: Ĉu vi freneziĝis?

Predslava: Mi freneziĝos, se ĉi tiu homo ne foriros. Filo, amata filo mia, jes, mi amos vin, infano mia kaj toleros ĉiujn neindaĵojn de vi, mi toleros vian malamon, vian abomenon, ĉion! Nur forsendu ĉi tiun homon!

Boriso: Neniel mi forsendos lin.

Predslava: Ĉu vi ne havas eĉ eron da indulgo en via koro al via patrino? Ĉu vi ne forsendos lin?

Boriso: Sed kio vin trafis?

Predslava: Ne demandu, nur forigu lin de antaŭ miaj okuloj. Mi, petas, mi trudas vin.

Boriso: Ne!

Predslava *(al Saŭlo):* Sinjoro… kavaliro…

Saŭlo: Ordonu, sinjorino!

Predslava: Mi petas vin, foriru!

Boriso: Silentu, virino!

Predslava: Mi petegas vin, foriru, foriru el ĉi tiu kastelo, el ĉi tiu regiono, el ĉi tiu lando… ne, mi ne povas kontraŭstari! *(Skuplorante ĵetas sin sur la kolon de Saŭlo.)*

Saŭlo *(al si):* Mi komprenas nenion.

Predslava: Ne liberigu vin el miaj brakoj, kavaliro, mi ne ellasos vin el mia koro. Ho, mia kompatinda koro, de kiel longe vi ne batis tiom pro feliĉo kaj turmento! Sed nun foriru, kavaliro, foriru, por ke neniam ni revidu nin.

Saŭlo *(flanken):* Ĉu mi trafis inter frenezulojn? Sed mi havas mirindajn sentojn. Neklarigeblajn. Mi tre bedaŭras ĉi tiun kompatindan virinon. Ŝiaj larmoj bruligas miajn vangojn. Kiel febre ŝi premis min al sia brusto! Preskaŭ haltis mia spiro.

Predslava *(kun petega voĉo):* Ĉu vi do ne foriros?

Saŭlo: Se vi tiel deziras. Dio benu vin ambaŭ! *(for)*

Predslava: Dio gardu vin, adiaŭ!

Sesa sceno

Predslava, *Boris*

Boriso *(post Saŭlo):* Haltu, ĉu vi aŭdas? Haltu! Li foriris. Virino, vi freneza, kion vi faris?!

Predslava: Li foriris, dank' al Dio… kaj dank' al Dio, ke li estis ĉi tie!

Boriso: Morgaŭ vi veturos.

Predslava: Kien?

Boriso: En monaĥinejon.

Predslava: Mi ne iros.

Boriso: Ni vidos. Nun iru, preparu vin!

Predslava: Filo, ne mistraktu min, indulgu min, mi estas ja via patrino.

Boriso: Kiel tio tuŝus min?

Predslava: Ĉu eĉ fajrero de fila amo ne restis en vi?!

Boriso: Ne.

Predslava: Vi do forpuŝos min?

Boriso: Malaperigu vin!

Predslava *(longe kaj fikse rigardas Borison):* Bone, mi iras. *(rapide for)*

Boriso *(tintigas)*.

Servisto *(enpaŝas)*.

Boriso: Kuru post tiu kavaliro, kiu nun foriris! Rapide! Petu lin, ke li revenu! Petu lin en mia nomo! Se li ne volas veni, tiam... tiam revenigu lin per forto!

Servisto *(for)*

Sepa sceno

Boriso, pli *malfrue* Saŭlo

Boriso: Infero kaj damno! Ĉu freneziĝis tiu virino? Ŝi forsendis lin. Brakumis lin. Kio estas tio, kion tio signifas? *(Senvorte iradas tien-reen.)* Kaj se tiu homo ne revenos? ...Aĥ, li jam estas ĉi tie.

Saŭlo *(enpaŝas):* Mi konfesas, mi ne havas tiom da menso, por povi klarigi la okazintaĵon.

Boriso: Eĉ ne pensu pri ĝi, amiko, ignoru ĝin! La menso kelkfoje misfunkcias al mia kompatinda patrino. Jen ĉio.

Saŭlo: Efektive, el ŝia rigardo ankaŭ mi mem konjektis, ke temas pri io simila.

Boriso: Sed ni lasu tion! Do... hm... do...

Saŭlo: Do?

Boriso: Do se diri sen hezito kaj evito, vi estas ekzilito, ĉu?

Saŭlo: Se diri sen hezito kaj evito, mi estas ekzilito.

Boriso: Kaj ĉu vi ne ŝatus reveni en vian hejmlandon?

Saŭlo: Ĉu mi? Ne ja!

Boriso: Ĉu ne? Tondro kaj fulmo, kaj kial?

Saŭlo: Nur ĉar la ekzekutisto eble konservus mian kapon por eterna memoraĵo. Kaj tiel, sen kapo mi hontus pasi en la mondo.

Boriso: Sed por bona mono?

Saŭlo: Ĉu por bona mono?

Boriso: Kaj por brilaj esperoj?

Saŭlo: Ĉu por brilaj esperoj?

Boriso: Jes.

Saŭlo: Ekzemple?

Boriso: Palatineco.

Saŭlo: Ĉu palatineco?... Aĥ, mi komprenas. Al mi palatineco, al vi reĝeco, tiel vi pensas, ĉu?

Boriso: Ĝuste tiel.

Saŭlo: Sed eble pendumilo anstataŭ trono...

Boriso: Ankaŭ ĝin mi dividos kun vi.

Saŭlo: Senekzempla grandanimeco.

Boriso: Nu?

Saŭlo: Atendu iom, lasu min konsideri.

Boriso: Kiel longe al vi plaĉas.

Saŭlo: Hm, hm. *(flanken)* Min logas nek mono, nek rango... io alia, tute alia tamen.

Boriso: Ĉu vi decidis?

Saŭlo: Mi decidis.

Boriso: Kiel?

Saŭlo: Mi iros.

Boriso: Vi estas homo! Kiam?

Saŭlo: Eĉ tuj.

Boriso: Nur morgaŭ. Noktas kaj ŝtormas. Ripozu! Mia trezoristo provizos vin per vojaĝkosto. Kio koncernas la estontecon, mi diras nur: via propra intereso postulas, ke vi antaŭenigu miajn interesojn. Antaŭ ĉio...

Saŭlo: Ĉu vi ne fidas mian menson?

Boriso: Eĉ, prefere.

Saŭlo: Do mi petas vin, ne instruu min.

Boriso: Bone. Faru, kiel plaĉas al vi! Sed kio garantias, ke vi estos mia homo?

Saŭlo: Nenio.

Boriso: Ĉu nenio?... Tio, vere, estas la plej bona obligacio! Mi povas nek perdi ĝin, nek ĝi povas esti ŝtelita. Sed flanken la ŝercon; mi ne tre fidas homojn.

Saŭlo: Kvankam alian garantianton mi neniel povas starigi.

Boriso: Almenaŭ diru, kial vi estas ekzilita?

Saŭlo: Tion mi ne diros; sed mi diros, kio relogas min en mian hejmlandon.

Boriso: Kio?

Saŭlo: Venĝemo.

Boriso: Mi fidas vin.

Saŭlo: Bonan nokton! *(for)*

Boriso: Adiaŭ!

Oka sceno

Boriso, pli malfrue la servisto

Boriso: Fulmas, tondras. Ĝuste kiel en mia animo. Kiel fulmoj tra nuboj, miaj longvidaj planoj trarompas tra la estonteco. Fulmoj estiĝas kaj disperdiĝas. Ankaŭ miaj planoj. Kion mi jam ne provis? Ĉion vane. Ho, ambicio, diablo de mia animo, kial vi turmentas min? Jam ofte mi tiel vokis, sed ambicio estas surda, ĝiaj oreloj nur unufoje malfermiĝas, kaj tiam ĝi aŭdas fermnajli la ĉerkokovrilon super si. Kiel feliĉa mi povus esti, se ĉi tiu diablo ne hantus min! Mi havas edzinon, kiu amas min, kaj kiun ankaŭ mi amas. Jes, mi amas ŝin... ŝi estas la sola en la mondo, kiun mi amas. *(Tintigas.)*

Servisto *(enpaŝas)*.

Boriso: Ĉu la dukedzino jam ripoziĝis?

Servisto: Jes, duko.

Boriso: Vi povas foriri.

Servisto *(for)*

Boriso: Al ŝi, mi iru al ŝi! *(Prenas la lampon kaj ekiras; remetas ĝin sur la tablon.)* Ne, eĉ tiel mi ne povus ripozi. Kvankam mi estas laca. Mi multe pasis. *(Lasas fali sin en brakseĝon.)* Mia animo vagadas, malproksime for. Mi kapo estas peza. Plena de pensoj. Ŝarĝaj pensoj. Kiel kruculoj al la Sankta Tero, miaj pensoj migras armee al Hungario. Ĉiuj tien. Ĉiuj. *(Dormiĝas.)*

Naŭa sceno

Boriso, Predslava

Predslava *(kiu kaŝe jam plurfoje enrigardis tra la pordo, venas kun mallaŭtaj paŝoj.)* Silento. Li dormiĝis. Do vi sendas min en monaĥinejon? Mi sendos vin en la transmondon. Ĉit, patrinaj sentoj, ĉit! Vane vi vekiĝos, mi ne obeos viajn vortojn. Mi dronigos vin en la maro de mia venĝo. Ĉu li ne ĵus diris malvarme, decide, ke neniu fila sento al mi estas en li? Kaj se li ne estus dirinta, montris tion ĉiu lia ĝisnuna ago.

Klare li montris. Ho, kiom li jam turmentis min. Li elvenigis min el la monaĥinejo, ne pro favoro, ho ne; nur por turmenti min. Vi ne plu turmentos min, bona knabo! *(Levas sian ponardon.)* Estas tiel malvarme. Mi tremas de malvarmo. Mia sango frostiĝis osto. Revarmigu min, fajro de infero! *(Kiam ŝi direktas sian ponardon kontraŭ la brusto de Boriso, ekfulmas kaj tondras.)*

Boriso *(vekiĝas pro la tondro):* Kio blindigas min? *(Ree fulmas.)* La fulmo... *(Ekvidas Predslava.)* Aŭ ĉu via ponardo? Aŭ viaj okuloj?

Predslava: Eble ĉiuj tri.

Boriso: Kaj kion vi volas, kara patrino?

Predslava: Mi volas mortigi vin, kara filo.

Boriso: Do mortigu min, se vi aŭdacas.

Predslava: Via bonŝanco estas, ke vi vekiĝis.

Boriso: Kaj tiel vi ne havas animon spiti min? Ĉu?

Predslava: Hm!

Boriso: Karega patrino, vi estas tiel malkuraĝa kiel malica. Do mortigos vin mi.

Predslava *(terurite retropaŝas.)*

Boriso: Donu al mi tiun ponardon! Donu al mi, mi ordonas! Aŭ ĉu vi kredas, se mi ne ricevos ĝin mildavoje, ĉu mi ne povas forpreni ĝin perforte?

Predslava *(lasas fali la ponardon)*.

Boriso *(levas ĝin)*.

Predslava *(flanken):* Terure. Ĉu mi petegu por mia vivo? Ne. De li mi jam nenion petegas. Prefere mi mortos. *(aŭdeble)* Mortigu min!

Boriso: Mi faros, ankaŭ se vi ne diras.

Predslava: Finu! Rapide! Plej baldaŭ!

Boriso: Vi pravas, karega patrino, mi devas fini plej rapide. La komedio jam daŭras tro longe, kaj pli aŭ malpli frue ĝi same finiĝus, ĉar ni sen-

lime amas unu la alian, ĉu vere, karega patrino?

Predslava: Prave, karega filo.

Boriso: Kiel la diablo incenson, kiel... kiel... aĥ, por nia reciproka amo ne ekzistas komparo.

Predslava: Vere ne.

Boriso: Virino, virino! Kial vi naskis min?

Predslava: Filo, filo, kial mi naskis vin?!

Boriso: La naturo estis ebria aŭ freneza, kiam ĝi destinis vin mia patrino. Sobra, ĝi ne povis tion fari.

Predslava: Ho, sobra ĝi ne povis tion fari.

Boriso: La patrino volis murdi sian filon!

Predslava: Kaj la filo volas murdi sian patrinon!

Boriso: Jes. Mi malamus la tutan mondon! Nur tial mi ne faras tion, ĉar mi domaĝus malŝpari mian malamon al aliaj ol vi. Mia malamo estas la via. Komplete la via. Nedividite. En sia tuta senlimeco. Kaj mi havas kialon por ĝi. La sorto donis al mi ĉevalon, sur kiu mi povus konkeri la duonon de la tero. Ambicion. Virino, vi deŝiris min de ĉi tiu ĉevalo, kiu nun senmastre galopas tra la mondo, dum mi ĝemas... en la polvo! Vi estis la reĝedzino de Hungario. Vi malfideliĝis al via edzo. Kaj pro tio mi nun puniĝas. Kion mi ricevis anstataŭ la hungaran kronon? Ĉi tiun mizeran galician duklandon. Krome nur pro indulgo, kiel almozulo groŝon. Patrino, mi mortigos vin; preĝu, se vi volas!

Predslava: Mi ne volas. Mi havas nenion por danki pro la pasinteco, kaj mi havas nenion por peti por la estonteco. Mortigu min!

Boriso: Mortu do kaj damniĝu!... Sed ne, mi ne mortigos vin.

Predslava: Ha, ĉielo... Dio... ĉu vi ne mortigos min, ne mortigos min filo?!

Boriso: Mi ne verŝas vian sangon. Oni diras, la verŝita sango krias en la ĉielon kaj perfidas sur la tero...

Predslava: Prave, filo, la verŝita sango perfidas kaj krias en la ĉielon. Vi

ne mortigos min.

Boriso: Ne, patrino, mi ne mortigos vin. Mi strangolos vin.

Predslava: Dio ĉiopova! *(Ŝancelfalas en seĝon.)*

Boriso: Mi strangolos vin, patrino. Fermu viajn okulojn, ĉielo, fermu viajn okulojn, infero, por ke la universo ne skuiĝu pro la teruro, ĉar ion similan ĝi aŭ vidis iam aŭ ne. Sed estas egale. Tio devas okazi! *(Saltas al Predslava.)*

Deka sceno

La antaŭaj, Judito

Judito *(enkuras):* Ho, dank' al Dio, iu estas ĉi tie. Ĉu estas vi, mia edzo? Kaj vi...

Boriso: Kiu estas tiu? Aĥ, ĉu estas vi, mia edzino? Estas bone, ke vi venas. Sed kion vi volas ĉi tie? Kiu vokis vin? Kion malbonan vi havas? Kio trafis vin?

Judito: Ho, mia edzo, sed vin, vin kio trafis?

Boriso: Ĉu min? Nenio. Kio povus trafi min? Kion farendan vi havas ĉi tie?

Judito: Via vizaĝo estas pala... viaj okuloj brulas...

Boriso: Pri kio vi babilas?

Judito: Mia edzo...

Boriso: Pardonu, mia karega kunsortulino! Pardonu min! Mi estis kruda. Sed mia menso estas tiel konfuzita. Vidu, mia patrino misfartas. Mi ne scias, kion mi faras.

Judito: Mi havis teruran sonĝon, mia vivkunulo, teruran. Sed jam mi mem ne scias, kion mi sonĝis, nur ion teruregan. Mi alarmiĝis kaj desaltis de mia lito kaj kuris, por trovi homon. Ankoraŭ nun mi estas terurita. Mi ne scias certe, sed se mi bone memoras, mi sonĝis pri via patrino. Kio trafis vin, bopatrino?

Boriso: Tio povas esti. Povas esti. Sonĝoj ofte mirinde kolizias kun la realo. Sed nun jam estas nenio malbona. Ĉu, karega patrino, nenio

malbona?

Predslava: Nenio, karega filo. Etendu vian brakon, filino, mi estas iom malforta. Sed jam ne necesas. Mia forto revenis.

Boriso: Do bonan nokton!

Predslava: Dio donu ankaŭ al vi bonan nokton, karega filo! Mi dankas, ke vi rapidis helpi min. Mi rekompencos vian zorgemon. Ĝis tiam, koran dankon!

Boriso: Volonte, karega patrino... volonte. Ankaŭ alifoje.

Predslava *(forirante, sovaĝe retrorigardas al Boriso):* Tigro!

Boriso *(sammaniere):* Hieno!

KURTENO

DUA AKTO

Unua sceno

Taverno

Beghel, Bial, Korog ĉe tablo kun kruĉo kaj glasoj

Saŭlo *(sola ĉe alia tablo)*

Beghel: Vere bela estas la tablo de la vinumantoj. Kompleta ĉielregno. La kruĉo estas la luno, la glasoj la steloj. Ni trinku, kunfratoj!

Bial: Ni trinku, por la patrujo!

Korog: Jes, ni trinku por la patrujo. Ni ja povas fari por ĝi nenion alian, ni malriĉaj ordinaruloj.

Bial: Almenaŭ ni faras tion, kion ni povas fari por ĝi, kaj tial la konscienco ne eldiras verdikton super ni, kio estas granda feliĉo, ĉar ĝi estas vere rigora juĝisto, kiun ne eblas subaĉeti kiel la aliajn. Mi ne scias, ĉu ankaŭ aliloke la afero statas tiel, kiel ĉe ni en Hungario. Ĉi tie, kun ĉiam pli da esceptoj, nur tiu estas vera patrioto, kiu povas fari nenion por la patrujo. Kaj kiu povus fari ion, tiu estas fripono. Ĉu vi kredas, ke inter niaj baronoj pli multaj ol malmultaj troviĝas, kiuj jam hodiaŭ pretus transdoni la landon al tiu bandito Boriso.

Saŭlo *(komencas atenti la interparolantojn)*.

Beghel: Vi vidos, tiel longe li kaptados por ni, ĝis li foje enpoŝigos nin.

Bial: Sed tion li tamen ne atingos facile.

Korog: Ne ja, se ĉiuj hungaroj sentus tiel kiel ni ĉi tie... sed... la afero statas tiel, ke... hej... *(Levas sian glason, eligas krion.)* Pereu ĉiuj patrujperfiduloj!

Bial, Beghel: Pereu ĉiuj patrujperfiduloj! *(Levas la glason.)*

Saŭlo: Ĉu vi aŭdas tion, mia animo? Vi aŭdas kaj naŭziĝas. Ho, kiom mi ŝanceliĝis! Mi ŝanceliĝis, tamen ne falis. Dank' al Dio! *(Iras al la vinumantoj.)* Bravaj viroj, pardonu min, ke ne invitita, mi paŝas inter vin, sed mi ne povas deteni min, ne esti eĥo de viaj vortoj. Pereu ĉiuj patruj-

perfiduloj!

Beghel: Ili pereu, ankoraŭfoje!

Bial: Ili pereu, ankoraŭ milfoje!

Korog: Kiu kaj kio vi estas, samterano?

Saŭlo: Estas egale, ajnulo, ajn-io. Mi estas sigelita letero, kies adreson vi jam aŭdis: „Pereu ĉiuj patrujperfiduloj!" La estonteco malfermos ĉi tiun leteron; tiam vi povos legi ankaŭ ties enhavon.

Bial: Kiu ajn vi estas, via honesteco etendiĝas de via verto ĝis viaj piedoj. Sidiĝu inter ni kaj trinku kun ni!

Saŭlo: Ne tiel, samlandanoj! Trinku vi kun mi, mi ja tiel multe ŝuldas al vi, ke se vi trinkus ĝis la lasta juĝo miakoste, nenio estus repagita el mia ŝuldo. He, tavernisto! *(Enpoŝigas la manon kaj elprenas monujon.)* Ha, damnita mono! Mono de Boriso *(iras al la fenestro kaj nerimarkate elĵetas ĝin.)* Se vi permesas, samlandanoj, mi tamen trinkus kun vi. Min trafis misŝanco, mi perdis mian monujon.

Korog: Ne gravas, eĉ iom ne, sidiĝu kaj trinku!

Saŭlo *(sidiĝas inter ili, ili babilas, ne rimarkas, ke Predslava kaj Milutin venas.)*

Dua sceno

La antaŭaj, Predslava, Milutin

Milutin *(donas seĝon al Predslava):* Sidiĝu, sinjorino. Mi scias, ke vi laciĝis. Mi bedaŭras vin.

Predslava: Eble laciĝis vi, fileto, ne mi. Kiun movas venĝemo, tiu estas nelacigebla.

Milutin: Kaj kiun amo movas, estas samtia. Kun la diferenco, ke vi jam venis proksimen al via celo, kaj mi ankoraŭ distas. Eble mi eĉ ne atingos ĝin.

Predslava: Vi atingos ĝin, infano, kune kun mi vi atingos ĝin. Ne malesperu! Ne malpli interesas min venigi vin al via celo ol min mem. Iru kaj

demandu pri la ĝusta vojo tiujn homojn. Iam mi bone konis ĉi-regione la vojojn, sed mi jam forgesis ilin. Tio estis antaŭ longe.

Milutin *(proksimiĝas al la vinumantoj):* Sinjoroj, kiu bonvolus diri al mi, kiu vojo kondukas al la kastelo de s-ro Ŝimŝono?

Saŭlo *(saltleviĝas):* Ĉu al Ŝimŝono?... Kiu volas iri tien?

Milutin: Ni ambaŭ, sinjoro.

Saŭlo *(ekvidas Predslava):* Tiun virinon mi iam vidis, se mi ne trompiĝas. Jes, estas ŝi. Ŝi. De tiam plurfoje aperis ŝia bildo antaŭ mia animo, senvole. *(Iras al Predslava.)* Sinjorino, se mi vidus vin aliloke, mi dirus, ke vi estas la patrino de la duko de Galicio.

Predslava: Ĉit! Tiu mi estas.

Saŭlo: Ĉu vere? Kiel vi trafis ĉi tien kaj ĉi-maniere?

Predslava: Kaj vi... jes, vi estas tiu, kiun mi foje brakumis. Ho, amiko, permesu refoje brakumi vin!

Saŭlo: Volonte, se vi trovas ĝojon prie. *(Ili interbrakumas.)* Kion vi faras ĉi tie?

Predslava: Kompatu min! Mi estas tre kompatinda.

Saŭlo: Kompatinda sinjorino. Via voĉo tuŝas mian koron. Vi elvokas kunsenton en mi al vi.

Predslava: Dankon. Mi ja meritas vian kunsenton, ĉar mi amas vin. Senlime mi amas vin.

Saŭlo: Kaj kiel mi venis al ĉi tiu bonŝanco?

Predslava: Ne demandu! Estas ja egale. Mi nur simple amas vin. Kaj ĉar vi donacis min per via kunsento, prenu rekompence mian fidon. Ho, amiko, vi povas imagi, kio okazis al mi. Mia filo sendis min en monaĥinejon.

Saŭlo: Kaj kial?

Predslava: Ĉar li malamas min kaj scias, ke mi abomenas monaĥinejon. Ho, se mi estus havinta emon retiriĝi en klostron, li ĉiurimede malhelpus tion.

Saŭlo: Ĉu via filo malamas vin?

Predslava: Malamas, abomenas min.

Saŭlo: Terure. Senekzemple.

Predslava: Vere. Ĉu? Ho, se vi scius ĉion!

Saŭlo: Kaj kiel vi eskapis el la monaĥinejo?

Predslava: Mia filo konfidis min al ĉi tiu junulo, kiu estas, feliĉe, mia devigonto kaj kondukis min ne en monaĥinejon, sed eskapis kun mi ĉi tien, en Hungarion.

Saŭlo: Kaj nun kion vi intencas fari?

Predslava: Venĝi min.

Saŭlo: Kontraŭ kiu?

Predslava: Kontraŭ ĉiuj, kiuj faris min malfeliĉa.

Saŭlo: Kiuj estas tiuj?

Predslava: Vi vidos. Kaj vi kian farendon havas ĉi tie?

Saŭlo: Mi estas spiono de via filo.

Predslava: Ĉu spiono de mia filo?

Saŭlo: Pli ĝuste, mi estis, Dio gardu min de patrujperfido!

Predslava: Kaj kio volis fari vin patrujperfidulo?

Saŭlo: Mia pasio.

Predslava: Kiu pasio?

Saŭlo: Venĝemo.

Predslava: Kaj kontraŭ kiu vi volis venĝi vin?

Saŭlo: Ne estas verŝajne, ke vi konas lin. Ho, tamen jes! Vi menciis lian nomon, kiam mi estis ĉe vi.

Predslava: Ĉu Ŝimŝono?

Saŭlo: Li.

Predslava: Tiel ni povas reciproke premi la manojn.

Saŭlo: Ĉu ankaŭ vi malamikas al li?

Predslava: Ho kiom! Donu vian manon, ni ligu venĝaliancon.

Saŭlo: Mi rezignis la venĝon.

Predslava: Kial?

Saŭlo: Ĉar mi ne volas iĝi patrujperfidulo.

Predslava: Kaj se la venĝo efektivigeblus sen patrujperfido?

Saŭlo: Kiel?

Predslava: Vi ekscios. Donu vian manon!

Saŭlo: Jen ĝi.

Predslava: Jen tiel, kaj nun konduku min al Ŝimŝono!

Saŭlo: Sed li ne devas vidi min.

Predslava: Nur konduku min tien kaj atendu proksime! Milutin, venu!

Saŭlo: Ni iru. Amikoj, se vi permesas, mi ne povas uzi vian komplezon; mi devas montri la vojon al ĉi tiu damo. Adiaŭ! *(Saŭlo kaj Predslava for)*

Beghel, Bial, Korog: Dio benu vin sur via vojo!

Tria sceno

Milutin, *Beghel*, *Bial*, *Korog*

Milutin: Ho Dio, mi ĉiam pli teruriĝas. Mi konjektas, ke Judito ne estos la mia, kaj mi venos en la manojn de ekzekutisto. Se Boriso atingos min, al mi iĝos fino. Nu, egale. Mi ĉion metas sur unu karton. Mi ja riskas mian vivon por feliĉo; sen ĝi la vivo ja valoras neniom. *(for)*

Bial: Eble ankaŭ ni povus foririgi nin, kunfratoj?

Beghel: Hundo estas, kiu rapidas.

Korog: Kompano Bial pravas. Hejme oni certe jam senpacience atendas nin, kaj kun bona espero, do ke ni revenos, ŝarĝitaj per predoj. Mi povas diri, bele ni ĉasis.

Beghel: Hahaha, ja prave. Oni povas rapide satmanĝi per tio, kion ni

paffaligis.

Bial: Kiel ni elturniĝu?

Beghel: Jen la demando.

Korog: Ion ni ja povos mensogi. Kiu scipovus mensogi, se ne ĉasisto? *(ĉiuj tri for)*

Kvara sceno

Kastelĉambrego ĉe Ŝimŝono

Ŝimŝono kaj Predslava venas de kontraŭaj flankoj.

Ŝimŝono: Kiu estas tiu?

Predslava: Kompatinda maljunulino.

Ŝimŝono: Kion vi serĉas?

Predslava: Jam nenion. Mi jam trovis, kiun mi serĉis. Vin.

Ŝimŝono: Kaj kion vi volas de mi, maljuna sorĉistinaĉo? Mi povas ankaŭ antaŭdiri, ke vane vi venis, se aŭgurado estas via arto. Mi ne bezonas aŭgurojn.

Predslava: Mi ne estas aŭguristino. Male, mi volas paroli kun vi pri la pasinteco.

Ŝimŝono? Kion?

Predslava: Belan historion, se vi aŭskultos ĝin.

Ŝimŝono: Kaj se mi ne aŭskultos ĝin?

Predslava: Vi devas aŭskulti ĝin; alie mi aperos al vi en via sonĝo kaj muĝos ĝin en vian orelon.

Ŝimŝono: Hm, parolu do!

Predslava: Ĉirkaŭ dudek kvin jarojn antaŭe Kolomano estis la reĝo de Hungario.

Ŝimŝono: Mi scias.

Predslava: Vi povas scii ankaŭ la ceteron, mi nur volas memorigi vin.

Kolomano vivis kun sia dua edzino Predslava.

Ŝimŝono: Mi konis tiun personon.

Predslava: Ĉu vere? Do des pli la historio povas interesi vin. Kolomano tre amis Predslava, ankaŭ Predslava tre amis... ne Kolomanon, sed bravan junulon de lia kortego.

Ŝimŝono: Iun Ŝimŝonon, se mi bone memoras.

Predslava: Jes, vi bone memoras. Ankaŭ Ŝimŝono amis, freneze amis Predslava.

Ŝimŝono: Tio ne veras.

Predslava: Ĉu ne?

Ŝimŝono: Ŝimŝono ne amis Predslava.

Predslava. Ne gravas; almenaŭ li mensogis al la reĝedzino, ke li freneze amas ŝin, kaj tiu kredis liajn vortojn.

Ŝimŝono: Kiel speco de simplamensa virino.

Predslava: Ŝi ankaŭ puniĝis pro tio.

Ŝimŝono: Ŝi meritis tion. Sed ni finu laŭgrade ĉi tiun tedan historion, kial tiri, detali? La reĝedzino naskis du knabojn. Unu ŝi donis al Ŝimŝono, por ke li havu parton el la patraj ĝojoj, la alian ŝi donacis al la reĝo, kiu siaparte ne dankis por la donaco, ĉar li elflaris, ke kukolo vizitas lian neston. Sekve de tio li montris la pordon al Predslava, kiu post dudek kvar jaroj, mi ne povas imagi, kial, sendis vin al mi.

Predslava: Kial ŝi sendis min al vi? Ho, Ŝimŝono, kial vi ŝajnigas?

Ŝimŝono: Pri kia ŝajnigo vi parolas? Mi nenion ŝajnigis en mia vivo, eble nur amon, kiu, mi kredas, ne povas esti temo inter ni.

Predslava: Ĉu vi vere ne konas min?

Ŝimŝono: Ĉu mi? Pro kiu diablo mi konus vin? Ĉu mi estus eble balailo, sur kiu vi rajdis iam al la monto Sankta Gerhardo, sorĉistino!

Predslava: Kial moki tiun, kiu tiel amas vin? Ŝimŝono! Ŝimŝono! Ĉu vi amas min?

Ŝimŝono: Ĉu vi amas min?

Predslava: Jes, mi Predslava.

Ŝimŝono: Ĉu vi estus Predslava? Estas neeble!

Predslava: Kaj se mi tamen estus tiu?

Ŝimŝono: Do estu tiu! Hundon tio interesas. Cetere mi ne envias, ke vi estas tiu. Ha, terure vi maljuniĝis dum la dudek kvar jaroj, mi povas diri. La tempo ne domaĝe plugis vian vizaĝon…

Predslava. La malĝojo, Ŝimŝono, la malĝojo, ne la tempo.

Ŝimŝono: Ĉu eble am-malĝojo?

Predslava: Ankaŭ ĝi.

Ŝimŝono: Mi ja diras.

Predslava: Ĉu vi ne kredas min?

Ŝimŝono: Mi ja kredas, kial mi ne kredus vin? Tamen mi senlime kompatas vin, se tio veras; ĉar se ankaŭ antaŭ dudek kvar, dudek kvin jaroj mi ne amis vin, nun estus terure malfacile reciproki viajn sentojn.

Predslava: Vi do ne amis min.

Ŝimŝono: Dio atestas, ke ne.

Predslava: Kaj vi nun ne amas min?

Ŝimŝono: Diablo ŝovu sin en min, se mi amas vin.

Predslava: Ĉu vi estus min tiel hontige kokrita?

Ŝimŝono: Ĉu hontige aŭ ne, mi kokris vin.

Predslava: Estas terure! Tamen mi pardonas vin.

Ŝimŝono: Mi tre dankas.

Predslava: Mi petas nur unu aferon de vi.

Ŝimŝono: Ni aŭdu!

Predslava: Se vi jam ne amas, neniam amis min, diru, ĉu vi almenaŭ havas patrajn sentojn en via koro?

Ŝimŝono: Mi havas. Kaj kiel multajn! Se mia patra sento iĝus kanabaj semoj: unu kardelo satmanĝus per ili.

Predslava: Estas egale, kiom; gravas, ke vi havas. Tiel interesos vin la sorto de via, tio estas mia filo.

Ŝimŝono: Mi ne scias. Kaj se ĝi interesus min?

Predslava: Sed antaŭ ĉio: ĉu Saŭlo konas sian devenon?

Ŝimŝono: Por kiu celo?

Predslava: Ĉu li scias aŭ ne?

Ŝimŝono: Ne. Li estas mia adoptita filo. Mi decidis malkaŝi al li lian devenon, se mi vidos, ke li estas inda filo de sia patro; sed li ne fariĝis tia, ĉar li estas pli honesta homo ol mi, kaj tiel mi trovis en li ne multan plezuron. Pro tio mi silentis.

Predslava: Tiel ĉio estas en ordo.

Ŝimŝono: Sed parolu almenaŭ klare, se vi volas, ke mi komprenu vin!

Predslava: Mi parolos klare. Reĝo Adalberto devos fali.

Ŝimŝono: Kial?

Predslava: Por ke Boriso okupu lian lokon.

Ŝimŝono: Hm, kion komunan mi havas kun Boriso?

Predslava: Ĉu vi ne diris, ke en vi troviĝas patraj sentoj?

Ŝimŝono: Sed mi diris ankaŭ kiom. Kaj se mi eĉ tre amus mian filon: mi pli amas mian vivon, por riski ĝin pro li.

Predslava: Kiu multe volas gajni, tiu devas multe riski.

Ŝimŝono: Kaj kion gajnus mi?

Predslava: Kion? Se Adalberto falos, Boriso posedos la reĝan titolon, la potenco estos la nia, la via, kaj la potenco estas ĉio en la mondo.

Ŝimŝono: Kaj ĉu estos facile forigi Borison?

Predslava: Li estas pitanima, kovarda marioneto. Liaj ĝisnunaj enrompoj en Hungarion okazis nur laŭ miaj instigoj, urĝado.

Ŝimŝono: Damno kaj infero! Se kovarda, li ne estas mia filo.

Predslava: Li estas via filo.

Ŝimŝono: Kaj ĉu li scias, ke li estas mia filo?

Predslava: Ne. Li sciiĝos prie nur tempe de neceso.

Ŝimŝono: Hm, hm.

Predslava: Nu, kiel vi decidas?

Ŝimŝono: Mi ankoraŭ ne scias.

Predslava: Do ĉu ankaŭ vi estas kovarda?

Ŝimŝono: Kio? Ĉu kovarda? Mi montros, ke mi ne estas tia.

Predslava: Kiel?

Ŝimŝono: Tiel, ke mi depuŝos Adalberton de la trono.

Predslava: Vi estas glora viro. Tia mi esperis vin.

Ŝimŝono *(flanken, dum li iras tien-reen)*: Tremu, bela reĝedzino! Vi falos sub mian povon. Mia espero estas granda kapti vin en miajn manojn, ĉar vi estas virta. Jes, ankaŭ tio donas esperon por la venko. Virto malofte venkas en la mondo. Ĉi tie fiaĵo regas. Se ne estus tiel, eble ankaŭ mi mem estus honesta homo. Sed estas tiel, kaj mi havas nenian emon por martira krono. *(aŭdeble)* Ha, ĉevalbruoj kaj glavoklakoj. Tio estas ili. Kvazaŭ vokitaj kaj petitaj. Predslava, foriru en la apudĉambron! Miaj amikoj venas. Tiuj, kiuj helpos nin al nia celo. Ni preparas nin ĉasi. Antaŭ ol ekiri, mi trinkigos ilin ebriaj. Hungaroj ĉiam pretas ebriiĝi. Poste dum la ĉasado mi kondukos ilin en la kavernon de la arbaro Dombod.

Predslava: Kien?

Ŝimŝono: En kavernon de la najbara arbaro. Tie ni elteksos la konspiron, kio estos facila laboro, vinplena kapo estas ja malbona bastiono, facile konkureblas.

Predslava: Vi pravas. Tial mi esperas ĉion bonan.

Ŝimŝono: Vi povas esperi.

Predslava: Do, Ŝimŝono, tiam…

Ŝimŝono: Bone, bone. La „tiam” ni lasu por tiam. Iru!

Predslava: Ĝis revido, adiaŭ! *(for, dume)* Hahaha!

Kvina sceno

Ŝimŝono, s-roj Teodoro, Vas, Dengez, Göndör

Ŝimŝono: Bonvenon, amikoj miaj!

Sinjoroj: Estu salutata, Ŝimŝono!

Dengez: Ankoraŭ kiom da semajnoj, frato? Kiam ni povos festi la nupton?

Ŝimŝono: Ne ĉagrenu, bubo! Vi scias, ke mi abomenas jupulinojn.

Dengez: Eble pro tio, ke ili abomenas vin, ĉu?

Ŝimŝono: Mi ne povus diri.

Dengez: Mi opinias nur pro tio, ke de tempo vi tre retiriĝis de la kortego, t.e. de la kortegaj damoj, kvankam ja antaŭ nelonge…

Ŝimŝono: Ba, ni lasu tion! Ni parolu pri io pli saĝa. Frato Göndör, vi estas la plej maljuna inter ni. Vi decidu: ĉu estu akceptita mia propono aŭ ne!

Göndör: Prezentu ĝin, frateto!

Ŝimŝono: La vetero estas malvarmeta, tial antaŭ ol ekiri ĉasi, ni devus subŝtofi niajn vestojn. Kaj kio estas la plej bona subŝtofo? Mi kredas: vino. Do…

Göndör: Frateto, vi estas ido de la saĝa Salomono.

Ŝimŝono: Kaj vi aliaj, kiel vi opinias?

Teodoro: Ankaŭ pro estimo al maljuneco mi tenos min kun nia frato Göndör.

Dengez: Ĉu mi havis iam alian opinion ol vi, Teodoro? Sed la plej grava punkto restis. Kiel opinias prie frato Vas?

Vas: Hehe, frateto, mi estu pendumita, se mi obĵetas. Ĉu mi ja kutimas kontraŭstari al la plimulto? He?

Dengez: Ne, neniel. Via moŝto iras post la plimulto kiel ŝafo post tintilo.

Vas: Mi estu pendumita, honorvorte?

Ŝimŝono: Kiel mi vidas, mia propono estas akceptita.

Teodoro: Kiu ne akceptus tiel superban proponon? Ne estus la sango de Arpado tiu, kiu ne akceptus ĝin.

Ŝimŝono: Kaj mi aŭguras: ĉiu paffaligos tiom da bestioj, kiom da glasoj li malplenigos.

Teodoro: Do mi paffaligos la plej multajn.

Vas: Frateto, kiel vi kuraĝas aserti tion? Ĉu vi ne vidas, ke ankaŭ mi ĉeestas?

Dengez: Frato Vas pravas. Lia estas la unuaeco. Li trafos plej multe, se nenion alian, do malplenon, ĉar li estas la unua ĉampiono en drinkado landvaste.

Vas: Mondvaste!

Göndör: Cetere ne estas kaŭzo fanfaroni per tio, frato.

Dengez: Kial ne fanfaroni? Kiuj havas neniun alian econ eminentan, tiuj kutime fanfaronas per tio, ke ili estas elstaraj drinkantoj. Cetere, frato Vas, mi konas eĉ pli potencan drinkanton ol vi.

Vas: Mi volus koni lin.

Dengez: Via moŝto bone konas lin.

Vas: Kiu do li estas?

Dengez: Kiu? La nokto.

Vas: Kiu?

Dengez: La nokto. Vidu, la ĉelvolbo estas grandega pokalo, kiun la subiranta suno plenverŝas ĝiselflue per ruĝaj radioj kvazaŭ per vino, kaj la nokto ĉi tiun grandegan pokalon eltrinkas per unu tiro; nur surfunde restas gutetoj, kiujn ni nomas steloj.

Ĉiuj *(ridante for)*

Sesa sceno

Predslava, Milutin

Predslava *(venas el la apudĉambro kaj iras al la meza pordo):* Milutin!

Milutin *(envenas):* Ordonu, sinjorino!

Predslava: Iru tien, kie ni lasis la kavaliron, kiu alkondukis nin, kaj transdonu al li ĉi tiun leteron! Rapide. *(Reiras, de kie ŝi venis.)*

Milutin *(eliras)*.

Sepa sceno

Ĉambrego ĉe la reĝo

Adalberto, Heleno, Géza

Adalberto *(fone dormas en granda brakseĝo)*.

Heleno *(sidas apude, apogante sin sur la brako de la seĝo, kie Adalberto somnolas)*.

Géza *(kvinjara, envenas, tirante post si pezan madzon sur la tero)*.

Heleno: Ĉit! Ne bruu, fileto, via patro dormas. Dormu, mia malfeliĉa, bona edzo, dormu kaj sonĝu al vi okulojn, per kiuj vi povas trarigardi vian landon, por vidi propraokule tiun, kiu plej amas vin en la lando, vian Helenon!

Géza *(kiu forlasinte la madzon, provas kapti muŝojn):* Patrino!

Heleno: Kion vi bezonas, infano mia?

Géza: Donu al mi pinglon!

Heleno: Por kio?

Géza: Mi kaptis muŝon, mi elpikos ĝiajn okulojn.

Heleno: Ej, filo, kiel vi povas esti tiel kruela. Ellasu ĝin!

Géza: Ne ja, kial mi ellasus ĝin?

Heleno: Ĉar ĝi ne kulpis kontraŭ vi.

Géza: Kaj patro kontraŭ kiu kulpis? Tamen oni elpikis liajn okulojn.

Heleno: Prave. Sed vi estu pli bona ol la ekzekutistoj de via patro!

Géza: Ĉu ankoraŭ vivas la ekzekutistoj de mia patro?

Heleno: Sendube.

Géza: Nu, Dio vivigu ilin longe! Ĝis mi plenkreskos.

Heleno: Tiam?

Géza: Tiam Dio estu al ili mizerikorda, ĉar mi ne estos.

Heleno: Venu, filo, venu en mian sinon! Vi estas inda filo de via patrino. Sed vi ne bezonos venĝi vian patron.

Géza: Kial, patrino?

Heleno: Mi venĝos lin, filo.

Adalberto *(ĵus vekiĝinta):* Kiu parolas pri venĝo? Ĉu vi, karaj?

Géza: Mi, patro. Mi kaj mia patrino.

Adalberto: Forpelu ĉi tiujn sombrajn pensojn el via kapo, amataj miaj!

Heleno: Ho, mia edzo, vi estas tiel bona, tiel sankta. Via boneco estas nur oleo en la fajron de mia venĝemo. Se vi estus malbona homo, mi trankviliĝus pro la okazintaĵoj, pensante, ke tio estas la volo, puno de Dio. Sed vidi, ke la plej bona, la plej nobla estaĵo estas en tiel senhoma, tio estas, jes ja, en tiel homa maniero brulstampita, kripligita: tio ribeligas min!

Adalberto: Jes, brulstampita, sed ne kripligita. Oni forprenis miajn korpajn okulojn, kaj anstataŭ ili mi gajnis milionon de animaj okuloj; simile al tio, kiam la suno subiras, venas sennombraj steloj. La tero fermiĝis antaŭ mi, kaj la ĉielregno malfermiĝis. Mi vidas ĝin en ĝia tuta pompo, tuta senfineco, mi vidas ĉiujn ĝiajn anĝelojn, la plej bonan de ĝiaj anĝeloj, vin, mia kunsortulino! Ho, vi eĉ ne pensas, kiel feliĉa estas blindulo. Kio estas blindeco? Ĉielregna vualo, kiu forkovras de antaŭ la homo la mondon, kiun oni nomas valo de larmoj. Al la bonuloj estas pli bone ne vidi ol vidi la mizeron, kiu estas tiel ĉiutaga sur la tero, kaj kiun eĉ la plej riĉaj regantoj ne povus ekstermi. Ili povas helpi al kelkaj aŭ centoj, kaj eĉ se ili helpas al cent-miloj, restas ankoraŭ milionoj.

Kiom valoras guto da mielo en granda glaso da amaro?

Heleno: Jes, se preni vin, via nevideco estas por vi bonfaro, sed ju pli noble vi sentas kaj pensas, des pli granda estas la perdo por tiuj multaj, al kiuj vi estus povinta helpi, al kiuj vi estus helpinta.

Adalberto: Ĉu mi estus helpina? Kiu scias? La homoj estas ofte bonaj pro tio, ĉar ili ne havas okazon esti malbonaj. Kaj ĉu mi ne estas unu el tiuj homoj? Kiu garantias, ke mi ne iĝus kun vidaj okuloj diboĉema, kruela, tirana reganto? Laŭ tio vi kaj miaj subuloj eble ŝuldas dankon anstataŭ venĝon al miaj ekzekutistoj, ĉar tiel, se mi ne multe utilas, almenaŭ mi ne multe malutilas.

Heleno: Ne plu, mia edzo, ne plu! Se vi tiel daŭrigus, vi instigus min eĉ premii tiujn fiulojn, anstataŭ puni ilin. Kvankam ili devas puniĝi. Sed ni nun lasu tion.

Adalberto: Vi pravas. Ni lasu ĉi tiujn seriozajn aferojn. Kial malĝojigi niajn tagojn, minutojn, kiuj estas tiel karaj. Gaje, kara mia, bonhumore! Vidu, tre ofte vi diras min malfeliĉa, kaj tamen ĉiufoje mi estas tiu, kiu serenigas vin. Ĉu jam krepuskas?

Géza *(ĉe la fenestro):* La suno jam tiel proksimas al la tero, ke ankaŭ mi atingus ĝin.

Adalberto: Do ni eliru en la ĝardenon. Ho, mi tre ŝatas florojn!

Géza: Vi ja ne vidas ilin, patro!

Adalberto: Eble pro tio mi sentas duoble iliajn odorojn. Mi same estas kun vi, miaj amataj, kiujn mi ne vidas, sed des pli mi sentas la varmon de via animo, kiel la odoron de la floroj. Ĉu vi venas, kunsortulino mia?

Heleno: Mi tuj postiros, kunsortulo mia. Vi nur ekiru! Konduku vian patron, Géza!

Géza: Donu vian manon, patro. *(Prenas lian manon kaj elkondukas lin.)*

Oka sceno

Heleno

Heleno *(post paŭzo):* Estas terure. Li ne vidas tiujn, kiujn li tiom amas: sian filon, sian edzinon. Neniam li vidis min, neniam li vidos min. Li ne vidas, se mi ridetas, li ne vidas, se mi larmas. Kvankam miaj ridetoj kaj larmoj estas la liaj. Kaj ĉu li amas min? Ĉu eblas ami iun, kiun ni ne vidas. Jes, li amas, eble tiel kiel almozulo amas sian bastonon, sur kiu li apogas sin. Ho, se li vidus min, li amus min alimaniere! Estas egale, kiom ajn li amas min, mi amas lin vere, el mia koro, kiom virino povas ami sian edzon. Ha, kaj troviĝis malicaj animoj, kiuj volis forgesigi al mi miajn virinajn devojn, la fiaj!

Naŭa sceno

Heleno, *Saŭlo*

Saŭlo *(subite enpaŝas):* Mi estis unu el tiuj fiuloj, reĝedzino.

Heleno: Ha, Saŭlo!

Saŭlo: Jes, reĝedzino, Saŭlo, kiu amas vin, kaj kiu pro tio estas por ĉiam ekzilita.

Heleno: Kaj pri kies kapo estis verdiktita…

Saŭlo: Ke ĝi estos dehakita, apenaŭ li aŭdacos ankoraŭfoje porti ĝin en Hungarion.

Heleno: Kaj ĉu vi aŭdacis tion fari?

Saŭlo: Kiel vi vidas, mia favorkora sinjorino.

Heleno: Ne diru min via favorkora sinjorino, ĉar mi ne estos favorkora al vi.

Saŭlo: Tion vi ne bone faros. Se vi ne havas favoran koron al tiuj, kiuj amas vin…

Heleno: Ha!

Saŭlo: Kiuj estas viaj fideluloj, viaj fidelaj subuloj, mi volus diri…

Heleno: Ĉu vi eĉ instruas min? Bone, sed rapidu, ĉar vi ne plu havas

tempon por longe paroli.

Saŭlo: Vidu, vi estas favorkora al mi, reĝedzino.

Heleno: Ĉu mi?

Saŭlo: Jes. Antaŭ ol mi eldiris mian peton, vi jam plenumas ĝin. Tio estas pli da indulgo ol kiom mi esperis.

Heleno: Via peto?

Saŭlo: Laŭeble plej baldaŭ ekzekutigu min, kaj tio jen baldaŭ okazos. Tio kuraĝigas min, ŝarĝi vin ankoraŭ per unu peto.

Heleno: Parolu rapide!

Saŭlo: Antaŭ ol paroli, bonvolu promesi ĝian plenumon. Mortonto petas vin, via reĝedzina moŝto, kaj vi ne rifuzos la agonianton.

Heleno: Mi ne rifuzos.

Saŭlo: Ĉu kio ajn ĝi estos? Ajne kurioza?

Heleno: Egale.

Saŭlo: Mia ekzekuto okazu sur tiu loko, kiun mi elektos. Estu mia malgaja konsolo, ke se mi mortos, mi almenaŭ mortos tie, kie al mi plaĉas.

Heleno: Bone.

Saŭlo: Taĉmento da soldatoj estu mia funebra akompano. Se mia vivo estis simpla, almenaŭ mia morto okazu kun iom da pompo.

Heleno: Ĉu tiom?

Saŭlo: Ankoraŭ restis io.

Heleno: Nome?

Saŭlo: Ankaŭ vi ĉeestu ĉe la ekzekuto, reĝedzino…

Heleno: Ĉu ankaŭ mi ĉeestu?

Saŭlo: Mi petas, devigas vin.

Heleno *(flanken)*: Stranga homo, kio enkapiĝis al li? *(aŭdeble)* Por kiu celo vi volas, ke mi ĉeestu?

Saŭlo: Por neniu celo. Nur kaprico. Kaprico de mortonto. Sed vi plen-

umos ĝin, sinjorino, ĉar mi havas vian promeson.

Heleno: Por liberigi min el sub mia donita vorto, do... bone, mi indulgas vin.

Saŭlo *(mirigite flanken):* Damnite, tion mi ne atendis. Ne estis mia intenco. Mi devas kanti alian melodion. *(aŭdeble)* Kion mi aŭdas, reĝedzino? Ĉu vi indulgas mian vivon? Dankon. Sed vi ja indulgis vian propran vivon, ĉar la mia estas tute la via, jes la via, sinjorino. Viaj estas mia sango, mia animo, ĉio mia, ĉar mi amas, adoras vin tiel kiel iam, eĉ pli bone ol iam. Mia brusto estas tiel plena, tiel plena de amo, ke miaj piedoj ne tenas min, miaj genuoj fleksiĝas! *(Genuiĝas.)*

Heleno: Ha, aŭdaca!... Duoble kulpa! Iru kaj transdonu vin al la soldatoj. Baldaŭ mi sekvos vin... al la eŝafodo! *(rapide for maldekstren)*

Saŭlo *(for meze)*

Deka sceno

Kaverno

Ŝimŝono, Teodoro, Vas, Dengez, Göndör, sinjoroj venas unu post aliaj de fone, kie estas la mallarĝa enirejo de la kaverno

Teodoro: Ni alvenis, sed por kio? Mi ne scias.

Ŝimŝono: Baldaŭ vi ekscios.

Dengez: Ni ne ĉasos ĉi tie, ĉu?

Ŝimŝono: Ne; ni fiŝos ĉi tie.

Göndör: Kion, frateto?

Ŝimŝono: Orfiŝojn, frato.

Vas: Vi diras enigmajn fabelojn, Ŝimŝono, kvankam por tio, mi havas, mi konfesas, terure obtuzan kapon, hehehe.

Ŝimŝono: Do, sinjoroj...

Sinjoroj: Ni aŭdu!

Ŝimŝono: Pli ĝuste, tute ne, „sinjoroj”, vi ja ne estas sinjoroj.

Teodoro: Ĉu ni ne estas sinjoroj? Eĉ mia avo estis tio.

Ŝimŝono: Via avo ankoraŭ estis tio, sed vi ne.

Göndör: Kia, tia, mi tamen estas tio.

Ŝimŝono: Kia, tia! Kaj ĉu vi kontentiĝas pri tio?

Göndör: Jes, ĉar mi devas kontentiĝi. Ĉu mi kulpas pri tio?

Ŝimŝono: Vi kulpas. Vi ĉiuj kulpas. Frato Göndör, vi facile fajfas, vi manĝis la plimulton de via pano, pli-malfrue vi mordos la lastan panecon. Sed kio fariĝos viaj filoj? Da ili vi havas almenaŭ ses. Kaj kiom da bieno vi postlasos al ili? Se ili knedos ĝin flano, ili eĉ ne satmanĝos. Prefektujo Bihar estas bela peco da tero; ĉu vi havus ĝin?

Göndör: Mi havus…

Ŝimŝono: Ĝi estas la via. Dengez, vi ja havas panon por via supo, sed eĉ via selĉevalo havas tiom da titoloj, kiom vi mem.

Dengez: Hm, mi jam plurfoje peticiis ĉe la reĝo, sed…

Ŝimŝono: Ĉu vi volas fariĝi grafo de Óvár?

Dengez: Mi volus…

Ŝimŝono: Tio vi estas. Teodoro, se vi pelas cervon tra via bieno, dum kiom da tempo vi atingas ties limon?

Teodoro: Mia ĉevalo ne tre ŝvitiĝas pro tio.

Ŝimŝono: Zemplén estas longa prefektujo, eĉ du ĉevaloj povas kolapsi sub vi, ĝis vi atingas ĝian randon. Ĉu vi akceptas ĝin?

Teodoro: Mi akceptus ĝin…

Ŝimŝono: Ĝi estas la via. Frato Vas, via vizaĝo estas ruĝa kiel via vino. Ĉu vi tial amas ĉi tiun noblan trinkaĵon, ĉar laŭ koloro ĝi parencas kun via vizaĝo?

Vas: Povas esti.

Ŝimŝono: En Tolna estas longa montoĉeno, kiu produktas gloran vinon, fajran kiel la tagmeza suno kaj ruĝan kiel la subiranta suno. Frato Vas, ĉu vi havas emon ricevi ĝin?

Vas. Mi havus…

Ŝimŝono: Vi estas la sinjoro de Tolna. Kaj tiel vi ricevos ĉiuj vian parton, se…

Ĉiuj: Se?

Ŝimŝono: Se vi ne estas malkuraĝaj uloj.

Dengez: Ĉu malkuraĝoj? Diablo kaj infero!.. Kion ni faru?

Ĉiuj: Jes, jes, kion ni faru?

Ŝimŝono: Nenion, nur kriu post mi: Vivu reĝo Boriso! Bas Adalberton!

Ĉiuj: Vivu reĝo Boriso, bas Adalberton!

Dek-unua sceno

La antaŭaj

Saŭlo, Heleno neatendite envenas. Ekstere videblas armitoj.

Saŭlo: Bas Borison! Vivu reĝo Adalberto! Kaj nun, reĝedzino, ordonu al via ekzekutisto… Jen mia kapo. *(Genuiĝas.)*

KURTENO

TRIA AKTO

Unua sceno

Ĉambrego ĉe la reĝo

Adalberto, *Heleno*, *Saŭlo*, *Sülülü*, *multaj sinjoroj kaj damoj sidas ĉe pompa festena tablo*

Adalberto: He, vi bufono! Ĉu vi aŭdas, bufono?

Sülülü: Ĉi tie troviĝas pluraj uloj bufonaj, kompano, parolu pli klare! La vorto bufona estas boto de Herkulo, kiun kiu ajn el ni povas surmeti. Aŭ ĉu vi eble parolas ne al ni? Ĉu vin mem vi alparolis?

Adalberto: Ha, vi malinda, aŭdaca!

Sülülü: Kaj vi male blinda, aŭd-aĉa.

Adalberto: Retenu vin, bubo, ĉar se mi igos ĵeti bridon ĉirkaŭ vian kolon, vi eble pentos ne bridi vin!

Sülülü: Mi ne timas vin, kompano.

Adalberto: Kial vi aŭdacas ne timi min?

Sülülü: Ĉar mi scias, ke vi estas ŝtonstatuo, strecĉantan arkon, kiu nur celas, nur celas, sed neniam elpafas sian sagon. Mi ne volus esti via kreditoro, kompano.

Adalberto: Kial ne, he?

Sülülü: Ĉar neniam mi ricevus de vi mian monon. Vi nur promesas, sed ne donas. Nu, kaj ŝnuro kaj bastono ne estas mono. Mi kredas, se vi estus mia kreditoro, vi estus pli bona mastro de via vorto ol se vi promesas punon, ĉar estu dirite por via laŭdo, vi estas bona knabo, kompano.

Adalberto: Kiu dungis vin esti mia laŭdanto? Prefere silentu! Mankas nur, ke ankaŭ la bufono laŭdu sian reĝon, kvazaŭ li ne havus sufiĉe da laŭdantoj, flatantoj.

Sülülü: Ba, laŭdo ne egalas ĉiufoje flaton. Kaj se bufono laŭdas sian re-

ĝon, tiu povas esti konvinkita, ke li meritas la laŭdon. La aliaj parolas ne el sia animo. Sed kion vi volis diri antaŭ nelonge, kompano? Miaj oreloj kreskas pro scivolo. Cetere ja ne mirindas, ke mi scivolas, mi sidas kun virinoj ĉe unu tablo. Mi infektiĝis.

Heleno: Miaj damoj, ĉu vi ne dankas pro ĉi tiu komplimento?

Sülülü: Ho, ne lacigu vin, karaj, per danko. Mi liveras al vi pli multe, se vi bezonas. Aŭ ĉu mi ne pravas? Virino estas enkorpiĝinta scivolo. Ja malnova afero. Gardu vin, ne ofendu min, ĉar mi terure venĝos min al vi; ne tiel, ke mi ĵuras al vi amon, poste lasos vin en peĉo, ho ne; multe pli kruele. Mi iros al tiu, kiu ofendis min, kun multsignifa mieno mi diros al ŝi, ke "kolombinjo Junjo, Henjo, Lucinjo aŭ kiel oni nomas vin, ĉu vi scias, kio plej novas?" Ŝi demandos min per tremanta voĉo, "Kio? Diru, parolu, mi petas vin, mi trudas vin, Sülülü de mia koro!" Mi do obeas kaj diras: "Aŭdu do", tiam mi interrompos min kaj ekkrios: "Ve, nun enkapiĝas al mi, ke mi devas aperi tie kaj tie! Kaj kun tio mi lasos ŝin stari, kaj mi estos venĝita al ŝi, kiom nur eblas al virino. Nu, kompano, nun elpepu, kion vi bezonas!

Adalberto: Mi jam forgesis, kion mi volis diri.

Sülülü: Vi volis mensogi, kunfrato.

Heleno: La forgeso memorigas al mi, ke ankaŭ ni forgesis ion. *(Montras al Saŭlo.)* Ĉi tiun vesperon ni dediĉas omaĝe al ĉi tiu nobla kavaliro, kiu malkovris danĝeran konspiron, kaj ankoraŭ neniu levis sian glason por lia sano. Ni riparu, kion ni forgesis fari. Vivu kavaliro Saŭlo!

Ĉiuj *(levas siajn glasojn):* Vivu!

Sülülü: Li vivu longe kaj Dio donu, ke pli da tiaj meritoj li akiru ĉirkaŭ la trono, Dio donu, ke li malkovru multnombrajn komplicojn!...

Adalberto: Vi deliras, fripono.

Sülülü: Ho, mi volis propre diri: donu Dio, ke de nun li ne havu okazon fari tiajn utilajn servojn al la trono. Nu, kompreneble, mi aludas al tiaj utilaj servoj, kiel ĉi tiu estis.

Saŭlo: Reĝino, via favoro estas multe pli granda, ol por ĝi mi povus

inde danki vin. Miaj agoj... mia estonta vivo rakontu la dankon, por kies esprimo mia lango ne sufiĉas. Kaj vi ĉiuj bone faras, ke vi vivuas min, se vi deziras al mi longan vivon. Mi tre bezonas ĝin... por forpenti la kulpojn de mia pasinteco.

Heleno: Vi jam forpentis ilin, nobla kavaliro.

Saŭlo: Eble mi forpentis tion, kion mi pekis kontraŭ vi. Sed ankoraŭ restis unu. Ho, kiel bone, ke mi ekmemoras ĝin! Pli ĝuste, mi neniam forgesos ĝin. Mi ne forgesos ĝin. Eble eĉ en la tombo mi sonĝos pri ĝi. Kaj mia tomba sonĝo estos tiam terura, kaj tiam mi ne havos ripozon en mia tombo, kaj tiam sur mia tombo ne kreskos floroj, ĉar ĉi tiu sonĝo mordos iliajn radikojn kaj ili velkos. Estas unu peko. Se ekzistas infero, tiam Dio destinis ĝin por ĉi tiu peko, ĉar nenio alia meritas inferon. Se ekzistas diabloj kaj ili havas reganton, tiam ĉi tiu peko estas la krono de la duko de l' diabloj. Tio estas la patrujperfido! Ve al tiu, kiu ĝin kulpas, ve ankaŭ al tiu, kiu nur pensas kulpi ĝin. Gardu vin de venĝemo; ĝi estas spiono, kiun la satano elsendas, por subaĉeti por si animojn. Venĝemo logis min ĝis la sojlo, kiun se mi estus transpaŝinta, mi starus nun sur la damnita tero de patrujperfido, kie la larmoj de pento vane verŝiĝas ĝis la fino de la eterna vivo, kien la bona Dio ne etendas sian indulgo-disdonan manon. La hazardo, ĉi tiu neinvitita sed ofte kara gasto savis min. Ho, mia reĝo, mia bona, nobla reĝo, mi volis vin perfidi, mi volis esti unu el la manoj, kiuj deŝirus vin de la trono, kie neniu sidis pli inde ol vi.

Adalberto: Mi pardonas vin kun tiel sincera koro, kiel sincere vi konfesas vian eraron, des pli, ke ĝi ne iĝis ago, nur intenco, inter kiuj estas tiel granda diferenco kiel inter korpo kaj ombro.

Saŭlo: Ĉu Dio pardonos min kiel vi? Mi ĵuras, ke per virtaj agoj mi riparos miajn pekajn pensojn. Se mi estis, kiu volis renversi vian tronon, mi estos ĝis mia lasta spiro unu el ĝiaj subtenaj kolonoj. Fidu min, mia reĝo. Mi estas orfo, sed se mi havus amantan patron, kiu atencus vin, eĉ lin mi ne domaĝus.

Adalberto: Mi kredas viajn vortojn, nobla kavaliro. Mi konfesas, mi havas pli da fido al pentanta kulpulo ol al tiu, kiu neniam eraris.

Sülülü: Kompano, tiel do vi ne povas tre fidi vin mem.

Adalberto: Ĉu vi ree flatas?

Sülülü: Fulmo kaj tondro! Nun mi rimarkas tion. Sed mi diris tion vere nur pro tio, ke tuj nenio cetera enkapiĝis al mi, kvankam ĉiurimede mi volis interrompi vian pian babilaĉon, de kiu, se diri sincere, mi tre tediĝis. Mi ja ne estas tiel bufona, ke mi estu via bufono, por aŭskulti predikojn. Se mi scius, ke min trafos ĉi tie tiel plorinda sorto: mi estus irinta ĝis la infero kaj fariĝinta monaĥo. Sed jen vidu, pri la lupo rakonto, kaj la lupo renkonte.

Dua sceno

La antaŭaj, Boriso en robo de pilgrimanto

Boriso: La beno de Dio estu sur vi, reĝo, reĝedzino kaj subuloj!

Heleno: Estu bonvena, sankta patro, kio venigas vin inter nin tiel malfrue?

Boriso: Miaj lacaj piedoj kaj malsato.

Sülülü *(flanken):* Kaj la diablo. Mi ne ŝatas tian robon.

Heleno: Se vi laciĝis, sidiĝu, se vi manĝus, manĝu! Kvankam nia vespermanĝo estas finiĝonta, eble tiom ankoraŭ restis, por satmanĝigi vin.

Boriso: Dio pagu por via bonemo!

Sülülü: Hm, sur nia tablo ankaŭ fine de vespermanĝo estas pli ol sur la tablo de alia, honesta homo komence de vespermanĝo.

Boriso *(sidiĝas apud Sülülü)*.

Sülülü: Bona pilgrimanto, mi ja senlime respektas, estimas vian moŝton, sed neniel plaĉas al mi, ke vi sidiĝas ĝuste apud mi.

Boriso: Kial, amata filo?

Sülülü: Nur tial, ĉar facile mi restos soifa. Pilgrimantoj kutimas trinki kiel kondamnitoj al soifo.

Boriso: Ne zorgu pro via gorĝo, bona knabo. Mi ne vivas per vino.

Sülülü: Ĉu neee? Ha, mia reĝa kompano!

Adalberto: Kion vi volas, bubo?

Sülülü: Ĉu vi ne havas en via poŝo pecon da fulgo?

Adalberto: Por kio?

Sülülü: Mi volas noti senekzemplaĵon en la kamentubo. Ĉi tiu bona pilgrimanto ne trinkas vinon. Estu salutata apud mia flanko, vi estiminda escepto inter milionoj!

Boriso *(kolere saltleviĝas):* Ĉu vi do plu mokas min, sentaŭga fripono? Silentu aŭ anstataŭ via vino, kiun vi tiom domaĝas, mi sendas mian glavon en viajn viscerojn... *(Rimarkas sin.)* Ho, pardonu min, damoj kaj sinjoroj, ke mi perdis mian paciencon, sed vidu, mi estas iom bolsanga, kaj nenio tiom doloras la koron kiel malinda ofendo, pro kiu mi per mia tuta animo pardonas al vi, karega filo.

Sülülü: Mi dankas vin por via grandanimeco, bona pilgrimanto, kiu eble savos mian kompatindan animon de la eterna damniĝo. Sed vi menciis glavon, ĉu vi eble havas sub via robo ian pikilon, per kiu, se vi ankoraŭfoje ekbolus, vi povus sendi min abrupte en tiun altan palacon, kie Sankta Petro aŭ kiu diablo servas kiel pordisto, kaj kien mi, Dio donu, venu laŭeble plej malfrue, *(flanken)* kaj vi neniam.

Boriso: Ĉu glavo, karega filo, kial mi havus ĉe mi glavon? Ĝin mi ekmemoris pro tio, ke antaŭ nelonge mi demetis ĝin.

Sülülü: Antaŭ nelonge vi demetis la glavon, ĉu? Kaj kion vi faris, ĉu vi eble falĉis per ĝi herbon por la azeno de via monaĥejo, sur kiu vi kutimas rajdi al preĝejoj por almozpetado, *(flanken)* kaj kiun, ĉe neceso, kiu ajn el vi inde povus anstataŭi.

Boriso: Ej, ej, amata filo, vi daŭre plu havas grandan emon ironii. Ho, tio estas ja via metio. Vi estas bufono.

Sülülü: Jes, mia metio. Ĉiu homo havas sian metion. La niaj sufiĉe diferencas unu de la alia. Tamen en du punktoj ni tamen interkonvenas: sub tintilĉapo la animo estas simpla kiel kapuĉo, kaj sub kapuĉo la animo estas multkolora kiel tintilĉapo. Nu, sed rakontu, por kio vi bezonis

la glavon.

Boriso: Mi batalis, filo.

Sülülü: Ĉu eble kun diabloj?

Boriso: Jes, kun diabloj. Ĉar la diabloj, la paganoj estas malamikoj de la kristanaro.

Sülülü: Ĉu vi do venas el Palestino? Aĥ, tiam respekto kaj estimo al vi, granda viro; pardonu min, ke eĉ per vorto mi aŭdacis ofendi vin! Ho pardonu min! Sed ĉu vi ne kunportis ankaŭ pecon da pesto en via poŝo? Mi ne volus, ke vi iel hazarde lasus fali ĝin en mian glason. Ankaŭ mia kompano Adalberto apenaŭ ŝatus tion, ĉar li scias, ke tian specon de homo kiel mi oni ne povas aĉeti en ĉiu butiko. Hm, estas ja prave, ke da bufonaj saĝuloj estas tiom, kiom vi volas, sed saĝaj bufonoj kreskas ne en ĉiu grundo.

Saŭlo: Sed, pilgrimanto, rakontu al ni pri tiu sankta tero. Min ĝi tre interesus.

Heleno: Ne tiel, sinjoroj. Ni estas pli proksime al la frumateno ol al la nokto, ni jam povus iri ripozi. Ankaŭ morgaŭ estos tago. Tiam ni ĝoje aŭskultos vian rakonton pri Palestino.

Saŭlo: Estu laŭ via deziro, reĝedzino; kvankam mi konfesas, mi tre deziras aŭskulti liajn aventurojn en la lando de la sunleviĝo; se mi vidus, kiel li priskribas la teron, sur kiu li neniam pasis.

Boriso *(mirigite rigardas al Saŭlo.)*

Heleno: Sur kiu li neniam pasis?

Saŭlo: Neniam, ĉar li estas tiel malmulte pilgrimanto kiel mi.

Heleno: Ĉu ne pilgrimanto?

Saŭlo: Ne.

Heleno: Kio do?

Saŭlo *(stariĝas, post li ĉiuj):* Mi malkaŝos, kiu li estas. Laŭ tio prijuĝu, kio li estas.

Heleno: Kiu do li estas?

Saŭlo: Neniu alia ol la duko de Galicio, Boriso.

Ĉiuj: Ĉu Boriso?

Sülülü: Mi ja diris. Sub kapuĉo povas loĝi nenio alia ol hipokriteco.

Saŭlo: Boriso, kun kiu mi havis la okazon konatiĝi dum mia ekzilo, kaj kiu dungis min kiel sian spionon. Neu tion, se vi kuraĝas!

Boriso *(kiu ĝis nun staris hezite, ne sciante, kion fari, subite retrovas sin kaj trankvile parolas):* Ĉu mi neu? Kial mi neus tion? Jes, tio mi estas, duko de Galicio, Boris. *(Demetas sian kapuĉon.)*

Viroj: Ha, vere. Mortu li, mortu la perfidulo! *(Malingas siajn glavojn.)*

Boriso: Sentaŭga, skoria popolo, murdu min, se vi aŭdacas, jen mia brusto, jen mia koro!

Adalberto: Sinjoroj, silentiĝu! Mi aŭdis glavoklakadon. Kiu eltiris, reŝovu sian armilon!

Boriso: Adalberto, Heleno, miaj amataj parencoj, estu salutataj! *(Manpremas kun ili.)*

Saŭlo: Ha, kio nun okazos? Liaj amataj parencoj! Lupo en ŝaffelo!

Sülülü: Ba, ne! Azeno en leona felo, aŭ mi volas diri, leono en azena felo.

Boriso: Mi alportas pacon, miaj parencoj, mi atendas pacan akcepton ĉe vi.

Adalberto: Kion ajn vi alportas, estu paco via parto, des pli, se vi venas kiel parenco kaj ne kiel malamiko.

Saŭlo: Ne kredu lin, mia reĝo kaj mia reĝedzino!

Boriso: Jes, mi venas kiel parenco, nome kiel amanta parenco

Adalberto: Mi konfesas, kara, ke mi ne tre atendis tion de vi; ju pli ne atendita, des pli ĝoje mi aŭdas tion.

Boriso: Mi tediĝis de la malpacado, eble ankaŭ laciĝis de ĝi, estas egale, mi volas ĉesiĝi ĝin por eterne. De nun mi kontentiĝos per tio, kion mi ricevis de la sorto, kaj mi ne sopiros tion, kion mi povus ricevi. Ni estu pacaj, amikaj najbaroj, por nia reciproka defendo, ne kontraŭ la

alia ni eltiru niajn glavojn. Kaj sube de la ĉarto, en kiu nia estonta ligo estos skribita, staru kiel sigelo nia parenca amo.

Sülülü: Mi spertas tiel, ke hodiaŭ ĉiu fripono konvertiĝas.

Saŭlo: Ho, tiel alloge dolĉe nur la infero povas paroli.

Boriso: Nu, miaj parencoj, ĉu vi akceptos mian proponon?

Adalberto: Etendu puran akvon al soifanto kaj demandu: ĉu li akceptas ĝin? Donu al malsatanto molan panon kaj demandu, ĉu li akceptas ĝin? Malfermu al mallibera birdo la pordon de ĝia kaĝo, kaj demandu: ĉu ĝi elflugos? Kiel akvo al soifanto, kiel pano al malsatanto, kiel libereco al mallibera birdo: via propono estas tiel kara al mi, frato. La plej kara inter miaj pensoj, la plej varma inter miaj deziroj estas pacemo, ĉi tiu suno, kiu egale sendas siajn varmigajn kaj kreskigajn radiojn al montoj kaj valoj. Kaj ĉu ĝin mi ne akceptus de vi? Ĉu mi povus surprizi per pli kara donaco mian landon ol ĝi estas? Dio benu vin por ĉiu via vorto, frato, Li benu la horon, en kiu vi tiel konvertiĝis! Nun mi bedaŭras, ke mi ne vidas. Mi ne povas iri al vi, fali en viajn brakojn. Venu do vi al mi kaj faru tion!

Boriso *(brakumas lin):* Kara parenco!

Saŭlo: Noblakora, bona reĝo mia, ĉu vi kredas ĉi tiujn belajn vortojn? Ĉu vi ne scias, ke dolĉa veneno estas en ĝi, kiu estas pli terura ol la amara? Sed kial mi miras, vi ja ne konas la homojn, vi ne vidis la fulmojn de fiĝojo super la kisantaj lipoj. Demandu do, mia reĝo, kial venis al vi ĉi tiu bona parenco kun sia nobla propono en kaŝvesto?

Boriso: Silentu, servisto, ĉu vi postulas de mi konton?

Saŭlo: Servisto estas vi mem, servisto de la infero.

Boriso: Ha, kiam mi estas duka sango? Per mia glavo mi povus respondi al ĉi tiu impertinentulo!

Saŭlo: Hm, iam vi tamen opiniis min inda respondi per glavo al miaj vortoj. Vi scias: kiam vi levis de la tero tiun vian langon, per kiu vi volis respondi.

Adalberto: Mildigu vin, kavaliro! Parte mi aprezas vian konduton, ĉar

ĝi atestas vian fidelecon al mi, sed ni ne malheligu ĉi tiun belan tagon per la nubo de suspekto.

Saŭlo: Ne suspekto, reĝa moŝto, certeco. Ĉi tiu kaŝvesto kaj la ribeluloj, parto de kiuj jam trairis inter la manoj de la ekzekutisto, alia parto trairos, se tiel kara estas por vi la paco, kiel vi diras.

Boriso: Kiuj ribeluloj?

Saŭlo: Viaj komplicoj.

Boriso: Kalumnianta fripono!

Saŭlo: Mi kredas, je Dio, ke ĉi tiujn titolojn, kiujn nun vi ĵetas sur min, iam mi metos en unu peco ĉirkaŭ vian kolon tiel, ke vi sufokiĝos de ĝi.

Boriso: Miaj parencoj, ĉi tiu konspiro okazis ekster mia scio, mi ĵuras je la unusola Dio. *(flanken)* Mi ĵuras je Belzebuto, ke mi scias nenion pri la tuto.

Adalberto: Kaj eĉ se ĝi okazis kun via scio, ĝi estu forgesita, ĉar ĝi okazis antaŭ via nuna deklaro.

Boriso: Mi dankas vin, estimata, por via senlima bonvolo. La estonteco montros, ke mi ne estas malmerita je ĝi.

Adalberto. Mi esperas, mi kredas tion. Donu ankoraŭfoje vian manon, frato, poste ni retiriĝu por ripozo. Mi apenaŭ atendas endormiĝi. Se la realo estas tiel bela, kiel belaj estos miaj sonĝoj nokte.

Boriso: Se mi insiste petus vin, estimata, ĉu vi restus ankoraŭ kelkajn minutojn por mia kontento? Nun ni repaciĝis, ĉu ni ne pasigus iom da tempo kune per konfidenca interparolo?

Adalberto: Se vi tiel deziras, kun ĝojo. Sinjoroj kaj damoj, bonan nokton!

Ĉiuj *(klinas sin kaj eliras)*.

Saŭlo *(en si):* Mi restos proksime. *(for)*

Tria sceno

Adalberto, *Heleno*, *Boriso*

Boriso: Lasu min ankoraŭfoje premi vian manon, mia bona parenco. Kiom mi bedaŭras, ke ĝis nun mi ne faris tion. Anstataŭ la ekscitoj de la bataloj kiom da feliĉaj horoj mi povis vivi en la brakoj de la amo... ĉar sen amo ne ekzistas feliĉo, kaj sen paco ne ekzistas amo. Paco kaj amo kune estu de nun nia devizo!

Adalberto: Prave, paco kaj amo.

Boriso: Bela reĝedzino... jes, vi estas bela kiel mia edzino, kiel mia Judito... la famo de via beleco estas aglo kun potencaj flugiloj, kiu transflugis eĉ la altajn Karpatojn, kaj sekvis Dnepron ĝis la maro. Kiom mi kompatas vian edzon, kiu posedas ĉi tiun trezoron de ĉarmoj kaj ne povas vidi, kion li posedas. Mi ne dubas, li amas vin tiel, kiom vi meritas; ho, se li povus krome vidi vin!

Heleno: Mi petas vin, ne parolu prie. Tio estas la plej plorinda liutokordo de doloro en mia koro, kiu se ekvibras, mia animo malesperigite alarmiĝas kiel dormanta kolombo pro tondro, kaj en mia menso eklumas la fulmoj de venĝemo; kvankam hodiaŭ mi aŭdis, ke oni gardu sin de venĝemo, tamen mi ne povas forgesi ĝin, ĝi ĉiam sonas en miaj oreloj. Mi ne plu kuraĝas pensi pri tio, ke mi venĝu min al la kripligintoj de mia edzo.

Boriso: Ha, kaj ĉi tiuj banditoj ankoraŭ ne estas punitaj?

Adalberto: Ankaŭ ne estu. Mi ja neniel rericevos, kion mi perdis, eĉ per ajna venĝo.

Boriso: Ne ja. Sed kulpo devas esti punata laŭ la leĝoj de Dio kaj la homoj. Kaj ili devas puniĝi ekzemplodone, terure. Ha, se la puno ne okazus, ĉu tio ne egalus al doni trancilon en la manon de tiuj banditoj, por ke ili elpiku ankaŭ la okulojn de via filo kaj viaj nepoj, kiel ili elpikis la viajn? Tion oni ne devas preterlasi, nun la bonkoreco estus peko.

Heleno: Ĝuste, oni ne povas ĝin preterlasi. Mi venĝos vin, mia edzo, eĉ se mi mortus proe. Jes, sekvu kio ajn, ne gravas. De nun mi havu neni-

un alian penson ol ĉi tiun venĝon, ĝis ĝi plenumiĝos. Kaj ĝi devas okazi laŭeble plej baldaŭ. Jam morgaŭ mi faros la unuan paŝon. Jam sufiĉe longe mi prokrastas ĝin. Sed kiel mi komencu? Pri tio mi jam multe cerbumis. Jes, tiel estos plej bone. La lando donu satisfakcion al sia ofendita reĝo. Mi anoncos tutlandan asembleon, kaj tie ĝi plenumiĝu.

Adalberto: Edzino, mia amata edzino!

Heleno: Mi petas, devigas vin, mia edzo, nun ne parolu! Vi ree malpersvadus min, kiel jam plurfoje vi faris. Sed vi ne plu devas tion fari. Por ke mia decido estu sankta, sankta kaj neŝancelebla, jen mi ĵuras…

Adalberto: Heleno, mia kunsortulino!

Heleno: Mi ĵuras, ke mi venĝos vin! Tiel mia animo saviĝu, tiel mi venu en tiun patrujon, en kiu viaj okuloj malfermiĝos, mia kompatinda, malfeliĉa edzo, por ke vi ekvidu vian amatan edzinon.

Boriso: Glora virino, vi estas inda je la brila trono, kiun vi okupas.

Heleno: Nia vojo nun kondukas trans Tison. Mi kolektos la baronojn de nia lando en Arad, kie la granda ago devos okazi. Nun ni foriru, mia edzo, se la bona parenco permesas tion.

Boriso: Mi ne plu retenas vin, karaj miaj, ankaŭ mi mem komencas senti la bezonon de ripozo. Bonan nokton!

Adalberto: Ĝis revido, karega parenco. *(for kun Heleno)*

Kvara sceno

Boriso

Boriso: Estas superbe, hahaha, ĉio glitis glate, kvazaŭ oleita. Kiel mi deziris, hahaha! Multe pli bone estas, ke oni rekonis min. Cetere mi iĝus murdisto. Jes, mi estus murdinta Adalberton kaj Helenon. Tio estus la plej aŭdaca sed ankaŭ plej mallonga kaj plej certa vojo. Pri mia konscienco jam de longe mi ne meditis, por ke ĝi ne ĝenu min. Morgaŭ oni estus trovintaj mortintaj la reĝinon kaj la reĝon. Kiu faris tion? La suspekto trafus monaĥon, kiu estis ĉi tie kaj malaperis. Kaj al kiu venus en la menson, ke sub ĉi tiu kapuĉo Boriso majstris? Ĉe tio mi

mistrafis. Ne gravas, tio okazos egale. Mi atendas senfine multon de ĉi tiu asembleo. Ĉion. La partio de Adalberto enorme malpliiĝos, kaj ju pli ĝi malpliiĝos la partio de ĉi tiu simplamensa blindulo, des pli pliiĝos la mia. Monaĥejo konvenas al li, ne trono. Sed kiuj estas tiuj konspirantoj, pri kiuj temis? Mi scias nenion pri ili. Ne gravas, ili estas miaj homoj. Ili nur estis, prave, ĉar parto de ili jam amuziĝas en la paradizo. Ankaŭ tio estas akvo al mia muelilo. Iliaj restintaj parencoj certe inklinas prefere al mi ol al tiu, kiu dekumigis ilin. Sed kiel trafis ĉi tien tiu sentaŭga senhejmulo, kiun mi dungis por multa mono, por ke li akiru fidelulojn al mi? Kiom da enigmoj! Sed reen al mia edzino. *(Ekiras.)*

Kvina sceno

Boriso, *Saŭlo*

Saŭlo *(venas kun du glavoj*, *renkontas Borison ĉe la pordo):* Haltu!

Boriso: Aĥ, ĉu estas vi?

Saŭlo: Mi.

Boriso: Kaj kion vi volas?

Saŭlo: Vian vivon!

Boriso: Nu, ne.

Saŭlo: Jes.

Boriso: Ĉu do dueli?

Saŭlo: Por vivo aŭ morto!

Boriso: Kaj pro kio?

Saŭlo: Ĉu vi ankoraŭ demandas?

Boriso: Mi volus scii.

Saŭlo: Unue, ĉar... ĉar... nun mi ne havas tempon nomi la kialon aŭ plie miajn kialojn. Sed ankaŭ sen ili vi povas scii la respondon. Elektu! *(Etendas al li la glavojn.)*

Boriso: Ĉu ĉi tie, proksime al la reĝa paro? La glavoklakado vekus ilin.

Saŭlo: Vi pravas. Do ni eliru sub la liberan ĉielon. Mi iros, se vi deziras,

eĉ al la plej fora glaciinsulo de la terpoluso, nur por dueli kun vi.

Boriso: Sed mi jam diris, ke mi estas sango de regantoj, kaj vi…

Saŭlo: Aĥ, do pretekstoj. Nun mi vidas, ne la proksimeco de la reĝa paro, ne via dukeco sed kovardeco. Nun mi jam ne tuŝos vin; vi povas foriri, kovarda bastardo.

Boriso: Ha, impertinenta aŭdaculo, vi eldiris mortan verdikton pri vi mem. Glavon!

Saŭlo: Ni vidos. Elektu!

Boriso *(kaptas ambaŭ glavojn):* Nu, do ni vidu!… hahaha! Kion nun vi faros, heroa knabo? Vidu, vi estas tiel malsaĝa ŝtipkapulo, kia vi opiniis min. Ĉu mi duelu kun vi? Post kiam mi scias, ke en du landoj mi havas la plej bonan glavon, sed la via estas eĉ pli bona ol la mia. Hm, kaj estas al vi facile dueli. Kion vi riskas? Ĉu vian mizeran vivon, ion alian vi ja ne havas. Estus ja granda gloro forpreni la unusolan sekan panp econ de la almozulo! Kaj kion riskas mi?! Amon kaj tronon, ĉiu de kiuj multe pli valoras ol la espero de transmonda saviĝo. Tiel malsaĝa mi ne estas. Vi povas vidi, ke dueli kun vi estus tia, kiel meti en veto milionojn kontraŭ filero. Sed kiel mi nun donas klarigojn al vi, kvazaŭ mi ŝuldus ilin? Malaperigu vin tuj de ĉi tie, aŭ mi forpelos vin per glavoplato kiel hundon.

Saŭlo: Ha, damnita! Duko de Galicio, vi estas tia kanajlo, el la cerbo de kia ankoraŭ ne festenis korvoj, nutrantaj sin ĉe pendumiloj. Vi meritus, ke mi dishaku vin en tiom da pecoj, kiom pendumiloj staras en via lando, por ke ĉiu havu unu pecon el vi.

Boriso: Kaj vi meritus, ke bazaristinoj surkraĉu vian langon, kiu fuŝas en ilia arto. Forbalau vin!

Saŭlo: Forgesu Dion aŭ la diablon, je kiu vi kredas, forgesu ĉion, nur ne ĉi tiun tagon! Kaj se vi forgesus, mi memorigos ĝin al vi. *(for)*

Sesa sceno

Boriso

Boriso: Nur minacu min, tion mi tre ŝatas. Pro tiu, kiu minacas, oni ne zorgu. Bojanta hundo malofte mordas. Kaj tamen: li estis en mia mano, en mia potenco, ĉu ne estus pli bone mortigi lin? Ĉi tiu ŝtipkapulo estas ŝtono sub mia piedo. Mi devintus lin enfosi, ne forkiki. Pli malfrue mi povus stumbli je li. Ba, for la zorgojn! *(for)*

Sepa sceno

Simpla ĉambro kun baldakena lito

Judito

Judito *(fone, profundiĝinte en siaj pensoj kubutas sur la fenestrobreto)*: La nokto foriras, kaj la dormo ne venas. Maldorme mi pasigis la nokton. Mi rigardis la stelojn. Mi divenadis: kiu estas la mia, kaj atendis, ke ĝi falos. Domaĝe, la mia ne estis inter tiuj, kiuj falis, ĉar mi ankoraŭ vivas. Ho, Dio mia, kiom valorus la ĉielo, se ĝi ne havus sunon. Kiom valoras floro, se ĝi ne havas odoron. Kiom valoras vivo sen amo? Kion mi ĝis nun apenaŭ kuraĝis pensi, nun mi jam kuraĝas eldiri: mi ne plu amas mian edzon. Sed ne mi estas ties kaŭzo. De tago al tago mi pli timas lin, de kiam li volis mortigi sian patrinon. Mi ne kuraĝis montri al li, ke mi ne amas lin. Ĉu li murdus min, se li sciiĝus? Kaj se li mortigus min? Mi ja ankaŭ cetere deziras morti. Morti jes, sed ne perforte. Ho, de tio mi teruriĝas. Kaj Dio scias, iu tre fora, mallaŭta, tamen perceptebla spirita voĉo flustras, ke mi ankoraŭ iĝos feliĉa. Mutiĝu, trompa esperiganto: kie mi trovus feliĉon? Se mia edzo ĉeestas, mi devas mensogi amon, se li ne ĉeestas, li enfermas min. Kial li faras tion? Nekompreneble. Ĉu li eble zorgas pro mi? Povas esti, ĉar li amas min. Ofte li spasme premas min en siaj brakoj, kvazaŭ mi estus roko super vortico, kiun se li ellasus el la manoj, li falus en senfundan profundon. Ho, kiom naŭzas min liaj brakumoj. Prefere serpento volviĝus ĉirkaŭ mia talio. *(Ekskuas sin; reiras al la fenestro, elrigardas.)* La aŭroro disfloras; la ĉielo ruĝas oriente, kvazaŭ maro brulus. Tie iu proksimiĝas. Ne mia edzo. Kiun mi vidas. Kiel li trafas ĉi tien? Ne, ne, tiu ne po-

vas esti; kaj tamen estas li. Ho, se li rimarkus min. *(Svingas sian tukon.)* Li ne rigardas ĉi tien. Ho, se li foje alĵetus rigardon por momento. Ha, la vojo forturniĝas. *(Gestas.)* Li ekvidis min. Li proksimiĝas. *(Gestas.)* Ĉi tie li estas. Ĉu vere vi estas, Milutin, mi ne kredas al miaj okuloj.

Milutin *(ekstere):* Mi eĉ malpli, sinjorino.

Judito: Do envenu! Ĉi tie iu povus vin ekvidi. Enpaŝu!

Milutin: Kaj la pordo?

Judito: Aĥ, ĝi estas ŝlosita.

Milutin *(enpaŝas tra la fenestro)*.

Oka sceno

Judito, *Milutin*

Milutin: Ĉu vi estas sola, sinjorino?

Judito: Sola. Kial?

Milutin: Ĉar estus oj kaj ve, se via edzo ekvidus min. Aŭ ĉu ne kun li vi venis en Hungarion?

Judito: Kun kiu alia mi povus veni? Kial vi timas mian edzon?

Milutin: Li mortigus min, se ni renkontiĝus.

Judito *(flanken):* Ha, li do volas nur mortigi ĉiujn! *(aŭdeble)* Kion vi kulpis kontraŭ li?

Milutin: Ĉu vi ne scias, ke li ordonis al mi akompani lian patrinon al monaĥinejo?

Judito: Mi scias.

Milutin: Ĉu ankaŭ tion vi scias, ke mi ne alkondukis ŝin, sed ni fuĝis ĉi tien?

Judito: Ĉu ne en la monaĥinejon sed ĉi tien?

Milutin: Jes, sinjorino. Kial, kial ne, ŝi ne volis enklostriĝi.

Judito: Kaj vi kompatis ŝin, bona knabo.

Milutin: Jes ja, mi kompatis ŝin…

Judito: Kaj?

Milutin: La ceteron mi ne aŭdacas eldiri, sinjorino.

Judito: Kial?

Milutin: Vi koleriĝus. Vi ekmalamus min.

Judito: Ĉu vin malami?! Ĉu mi? Parolu aperte, libere!

Milutin: Ĉu vi permesas?

Judito: Mi deziras, ke vi parolu.

Milutin: Bone. Mi eldiros ĉion, eĉ se mia vivo dependus de silentado. Mi devis obei al la reĝedzino, eĉ se mi ne kompatus ŝin. Ŝi venis en la posedon de iu mia sekreto, pere de kiu ŝi povas trudi min al ĉio.

Judito: Kaj ĉi tiu sekreto?

Milutin: Ho, ĉi tiu sekreto, ĉi tiu sekreto! Mi sentas, ke mia gorĝo ŝtopiĝus, antaŭ ol mi eldirus ĝin.

Judito: Se vi volas reteni ĝin, mi ne devigas vin eldiri ĝin.

Milutin: Ho, ne, ne; mi ne volas reteni ĝin. Mi devas eldiri ĝin. Sed mia kapo turniĝas. La sekreto estas, sinjorino, ke mi amis... amas vin!

Judito: Ĉu vi amis min?

Milutin: Mi amas vin, sinjorino, amas vin. Ĉar tiu ne estis amo kompare kun mia nuna amo. Kaj ĉu vi nenion rimarkis? Nu, mi ja ne kuraĝis montri ĝin.

Judito: Kaj se vi ankaŭ estus ĝin montrinta, mi havis tiam okulojn nur por mia edzo.

Milutin: Kaj nun?

Judito: Ho, Milutin, se estas vero, ke vi amas min, savu min de mia edzo! Vi vidas, mi estas lia kaptito. Vi eĉ ne povus veni tra tiu pordo. Savu min, Milutin, se vi povas! Savu min! Mia danko ne estos pli mallonga ol mia vivo.

Milutin: Ĉu savi vin? Plej ĝoje tra fajro, akvo, sagoŝtormo, tra ĉiuj danĝeroj! Disponu pri mia vivo, sinjorino! Eble iam vi amos min pro mia fi-

deleco aŭ pro kompato. Kaj se neniam vi amus min, mia pasio estas multe pli nobla, multe pli sankta ol ankaŭ sen premio mi ne farus ĉion por vi. Kaj ĉu mi ne iĝos sufiĉe feliĉa ankaŭ per tio, ke mi nur povos vidi vin, se mi povos esti en via karega proksimeco, ĉar eble vi ne forpelos min de vi pli malfrue, ĉu vere? Sed ni rapidu, ĉar via edzo povos alveni…

Judito: Li pli malfrue alvenos, sed ĉiuokaze estos bone laŭeble plej rapide foriri.

Milutin: Kie li estas? Kion vi du faras ĉi tie?

Judito: Mi ne scias, kial ni alveturis. Sekrete ni venis. Kaj mi ne scias eĉ tion, kien li foriris. Li diris, ke ĝis mateno li revenos.

Milutin: Ho, tiam ni rapidu. La ruĝaj nuboj jam flaviĝas, la suno pasas inter la tero kaj ĉielo.

Judito: Kaj kien for de ĉi tie?

Milutin: La patrino de via edzo restadas ne malproksime. Ŝi sendis min al la kortego, kie mi devas renkontiĝi kun certa kavaliro. Sed mi lasos tion por pli malfrue. La unua estu via saviĝo. Unue al Predslava, kie eblos decidi pri la estonteco.

Judito: Sed ĉu ni ne povus trafi dumvoje mian edzon?

Milutin: Mi ne scias. Estas egale. Ni devas riski.

Judito. Ĝuste, ni devas iri.

Milutin: La arbaro, kiu komenciĝas ĉi tie, etendiĝas ĝis tie, kien ni devas iri, kaj tra ĝi kondukas nur mallarĝa pado… eble…

Judito: Bone. Ni iru.

Milutin: Dio mia! Nur nun helpu min! Sinjorino, permesu al mi kisi vian manon! *(Kisas ŝian manon.)* Dankon.

Judito *(karesas lian vizaĝon):* Bona knabo! *(ambaŭ for tra la fenestro)*

Naŭa sceno

Post paŭzo la ŝlosilo de la pordo dufoje turniĝas, alvenas Boriso.

Boriso: Mi alvenis, kara mia edzino. Ĉu vi dormas? Ŝi ne respondas. Ŝi dormas. Dormu kaj havu tiel belajn sonĝojn, kiel bela vi mem estas! Vi estas bela anime kaj korpe, tiel bela, kiel malbela estas mia animo. Mi konfesas, Dio scias, se mi estas en via proksimeco, mi sentas min pli bona, almenaŭ mi agnoskas, ke mi estas malica, kaj mi preskaŭ pentas miajn pekojn, aŭ kiel la mondo nomas tiajn agojn, kiaj estas la miaj. Se mi ankoraŭ ne estas monstro, mi iĝus tio certe, se mi ne havus ĉi tiun virinon. Se mi ankoraŭ ne demetis tute la homan naturon: tio estas la merito de mia edzino, sole la ŝia. La glavo super mi pendas sur fadeneto, kaj se ĝi falus, mortigus en mia koro la lastan senton de bono. Mia edzino estas la fadeneto, de kiu ĉi tiu glavo pendas. Kaj mi amas, adoras ŝin. Por ŝi mi eble oferus ankaŭ la planojn de mia ambiciego. Ŝi estas la sola aŭ almenaŭ mia ĉefa trezoro. Kaj tial mi zorgas tiom pro ŝi. Se mi perdus ŝin, se ŝi mortus... Ha, foriĝu, damnita penso, kiun diablo sendis supren el la infero, por antaŭsenti la turmentojn, kiujn post mia morto mi suferos? Se veras, kion la pastroj predikas. Ne, ne, mi ne povas perdi ŝin, ŝi devas transvivi min, por ke mia ĉerkotolo ne restu senlarma. Mi sentas, nur ŝi, sole ŝi faligos sur ĝin larmojn. Sed tiom sufiĉos. Ho, mia edzino, mia amata, karega edzino! *(Proksimiĝas al la lito, mallaŭte detiras la kurtenon.)* Miaj okuloj, ĉu vi blindiĝis, ĉu vi ne vidas ŝin? *(Palpas la liton.)* Ĉi tie ŝi ne estas! *(Rigardas dekstren, maldekstren.)* Mia edzino... mia kunsortulino... Judito... Judito! Judito, kie vi estas? Ĉu vi ne aŭdas mian voĉon? Ĉu mi eligu krion, de kiu la ĉielo kolapsu kaj frakasu la mondon?! *(kuras tien-reen tra la ĉambro.)* Mia edzino, Judito! Kie vi kaŝis vin, la pordo estis ja ŝlosita, vi ne povis eliri... Ha! *(Kuras al la fenestro.)* Malfermita! Malfermita! Ĉu vi eskapis aŭ estas forrabita? Egale, la fenestro estas malfermita, malfermita! *(Amare ekploras.)*

KURTENO

KVARA AKTO

Unua sceno

Baját, Zsember, Rád, Gedő, baronoj, nobeloj en pli-malpli grandaj grupoj.

Ebenaĵo ĉirkaŭ Arad. Fone tendoj, inter ili tiu de la reĝo. Meze de la scenejo purpura brakseĝo.

Baját: Diru al mi viaj moŝtoj, kio estas la celo de la tutlanda asembleo?

Zsember: Ĝuste tion ankaŭ mi mem volis demandi.

Rád: Ankaŭ mi ne estas pli saĝa ol viaj moŝtoj en ĉi tiu afero.

Gedő: Kaj mi kredas, neniu el ni.

Rád: Se ne tio, ke la palatina ofico de Cis-Tisio vakiĝis.

Baját: Por tio ne necesis alvenigi amasojn el la duona lando. Ĝis nun almenaŭ ne estis kutime. Kaj kial estus alveninta pro tio la reĝo kune kun ĉiuj siaj parencoj? Ĉar li alvenis kun siaj edzino kaj infanoj.

Zsember: Eble li volas nomi sian heredonton.

Baját: Ba, lia menso ne foriris promeni, ke jam nun li pensu pri heredonto, li ja ankoraŭ povos vivi eĉ tridek jarojn, kaj mi ankaŭ deziras, ke li vivu tiel longe.

Gedő: Mi ne dubas, ke ni ĉiuj deziras tion.

Zsember: Kaj mi firme kredas, ke vere tio estas lia celo. Homvivo ne estas la mondo, ke ĝi eterne daŭrus. Kiu scias, kiam oni fermos al li la okulojn. Tial li volas garantii nian fidelecon al sia filo.

Gedő: Pri tio li povas esti certa.

Rád: Ne tute, dum Boriso vivas.

Gedő: Mi akceptas prefere mian hundon mia reĝo ol la bastardon.

Rád: Se tio estas nur suspekto.

Gedő: Estas egale. Jam ankaŭ ĝi sufiĉas. La tronon eĉ suspekto ne devas tuŝi. Ĝi estu pura kiel la sunradio, kiu venas el la ĉielo kaj iras en la

ĉielon, libera de ĉia tera malpuraĵo.

Rád: Suspekto ne estas koto, ke ĝi povus malpurigi; nur fumo, kiu kutime disiĝas en la aero.

Gedő: Sed ankaŭ fumo tuŝas. Krome Boriso estas perfekta fripono. Kvankam mi ne havas klarajn pruvojn de tio, tamen mi estas konvinkita. Hm, la duka mantelo multe kovras. Mi volus scii, kion li celis hieraŭ en la kortego. Damnite, li venas inkognite en nian hejmlandon, aperas en kaŝvesto antaŭ la reĝo, kaj post kiam estis malkovrite, kiu kaŝiĝas sub la kapuĉo, kun la plej kristana muzelo li superŝutas nian reĝon per belaj promesoj, kiu estis sufiĉe naiva aĉeti furaĝon por fromaĝo. Kaj la sekvan tagon la bela birdo ree malaperis. Kiu ne vidas ĉi tie friponecon, tiu estas mem fripono.

Baját: Via moŝto parolas, kvazaŭ ni ĉiuj estus la plej ĝisostaj partianoj de Boriso, kiujn li volas returni al si. Kia bezono estas por tio? Ni ĉiuj estas fideluloj de Adalberto, kaj niaj opinioj pri Boriso similas la vian.

Zsember: Kiu estis, kiu rekonis Borison en la kaŝvesto?

Gedő: La ekzilita Saŭlo.

Zsember: Ĉu la adoptita filo de Ŝimŝono?

Gedő: Tiu.

Zsember: Kiu perfidis Ŝimŝonon?

Gedő: Perfidi perfidulon ne estas perfido.

Zsember: Sed ankaŭ danko ne estis ĝia prezo. Tiun, kiu lin plenkreskigis, estis kvazaŭ lia patro, denunci, sendi en prizonon, eble eĉ sur la eŝafodon!

Gedő: Certe sur eŝafodon, kiun li ankaŭ elmeritis. La granda parto de liaj komplicoj jam trovis, por kio ili maturiĝis. Pli-malpli frue ankaŭ lia vico alvenos. Li estos la lasta, kiel decas. Li estis la tubero sur tiu brava klabo, kiu leviĝis por mortbati Adalberton. Tubero estas sur fino de klabo. Ĉu li ne meritis, ke Saŭlo tiel traktu lin? La maljuna vulpo estis ja li mem, kiu ekzilis sian filon.

Zsember: Prave.

Gedő: Nu, do.

Zsember: Sed ĉi tiu ekzilo iĝis al li utila. Se ĝi ne okazus, eble li ne estus denuncinta la konspiron de Ŝimsono, ĉar en tio venĝemo grave kunefikis…

Gedő: Kiu scias?

Zsember: Li ne rekonus Borison en lia kaŝvesto, kaj sen tio li ne gajnus tiel multe la indulgon de la reĝa paro.

Gedő: Tamen estus jam pli malfacile pruvi, ke Ŝimŝono havis la intencon, helpi sian filon, pere de la ekzilo, pli proksimen al la trono.

Pluraj: Hahaha!

Zsember: Estas egale, li ja helpis lin fakte pli proksimen, kaj sufiĉe proksimen. Viaj moŝtoj vidos, ĉi tiu homo ankoraŭ leviĝos alten.

Gedő: Dio helpu lin. Li meritas tion. Brava homo de la verto ĝis la plandoj.

Zsember: Sed eĉ se li ne estus tio…

Gedő: Kion via moŝto komprenas sub tio?

Zsember: Li estas favorato de la reĝedzino.

Gedő: Tiel! Mi dirus, amato de la reĝedzino.

Zsember: Kio signifas ja la samon.

Gedő: Ne tute. Krome estas kulpo suspekti la reĝedzinon, kion mi ne ŝatus ankoraŭfoje aŭdi, ĉar mi postulus satisfakcion en ŝia nomo. Kaj la aserto de via moŝto estas ja absurdaĵo. Ĉu ne pro tio ŝi ekzilis Saŭlon, ke tiu amis ŝin?

Zsember: Ankaŭ kontraŭ tio oni povus argumenti, sed via moŝto estas tre arda defendanto de la reĝedzino. Sed vidu, jam malfermiĝas la tendo de la reĝo.

Gedő: Vivu la reĝo!

Ĉiuj: Vivu!

Dua sceno

Adalberto, *Saŭlo*, *la antaŭaj*

Saŭlo *(kondukas Adalberton al la brakseĝo meze de la scenejo)*.

Ĉiuj *(formas duonrondon ĉirkaŭ Adalberto)*.

Adalberto: Mi salutas vin, miaj fideluloj, de kiuj mi deziras ricevi amon nur laŭ tia grado, en kia mi estas kaj estos via patro. Mi estas via patro. Ho, se mi havus tiel grandan forton, kiel granda estas mia deziro, plenumi mian patran devon. Sed pli malmulte mi neniam faros por via feliĉo, ol je kiom mi estos kapabla. Kaj donu Dio, ke tiajn vortojn vi aŭdu ankaŭ de la lipoj de miaj posteuloj, kaj ke ĉi tiuj ne restu nuraj vortoj en la dezerto, sed radikoj, radikoj de arboj de agoj, kiuj servas nian patrujon per ombro kaj fruktoj. La ofico de reĝoj estas bela kaj granda. Ili estas sunoj de la tero. Ilia devo estas brili kaj varmigi. Multaj forgesas ĉi duan kaj kontentiĝas per la unua. La sorto faris min nekapabla plenumi la unuan, des pli mi klopodas konveni al la dua. Ju malpli mi povas brili, des pli mi deziras varmigi: mi deziras feliĉigi vin. Se mi estus plenkapabla, mi gvidus vin sur la kampojn de bataloj, triumfoj, kie vi povus rompi al vi eterne verdajn frondojn de la kverko de la gloro por viaj kaskoj. Mi ne povas esti armeestro, tial mi volas esti terkulturisto en la ĝardeno de la paco. Se forestas la verda branĉo de la gloro sur via frunto, estu almenaŭ la floro de la silenta feliĉo sur via brusto. Mi ne povas pligrandigi la landon de miaj prauloj; ankaŭ stumpigitan mi ne volas transdoni ĝin al miaj posteuloj. Por tio estas ĉefa kaj eble la sola rimedo la paco. Tial akceptu mian konsilon, vivu en paco. Semu en viaj brustoj la grajnon de akordo, kaj sur viaj kampoj abunde kreskos vinberoj kaj tritiko. Sen ĝi vi ne kolektos, nek rikoltos, ĉar malakordo estas hajlo, kiu forbatas viajn semaĵojn kaj vitojn. Tio alportis jam multajn senfruktajn jarojn al la hungararo.

Gedő: Vivu la reĝo!

Ĉiuj: Vivu!

Gedő: Vivu la akordo!

Ĉiuj: Vivu!

Zsember *(en si)*: Belaj vortoj, sed apenaŭ eldiritaj, ili formortas. Mi konas vin, hungara nacio.

Adalberto: Antaŭ ol komenci la detalan interkonsiliĝon, ni plenigu la vakajn oficojn. Kavaliro Saŭlo, por via fideleco, montrita al ni, akceptu la pro morto vakantan ĉis-tisan palatinan seĝon, kaj alprenu la bienojn de la laste ekzekutitaj perfiduloj! Vi estas inda por ambaŭ.

Zsember *(al Rád)*: Jen, ĉu mi antaŭdiris?

Rád: Vere.

Saŭlo: Reĝo, mia sinjoro, se mi ne povos inde konveni al mia ofico, ne prenu tion kiel mankon de volo. Tiam prenu kiel kaŭzon vian korfavoron, kiu kapablis akcepti ĝin tia.

Adalberto: Pro tio mi ne zorgas. Se mi ne fidus viajn bonintencon kaj forton, mi ornamus aliulon per ĉi tiu bela kaj granda ofico, en kiu mi donas al vi kiel unuan devon konduki al fino la aferon de la malfideliĝinta Ŝimŝono. Mi metas lian vivon en vian manon. donu ĝin al la ekzekutisto aŭ redonu ĝin al li, laŭ via bontrovo. Miaj fideluloj, estas malfacile al mi eldiri ĉi tiujn vortojn, doloras min, ke ankaŭ ekzekutisto devas esti en mia lando. Sed ne estu fulmo, ne estos tondro. Gedő, vi estis unu el la plej belaj radioj de mia krono, akceptu kiel elmerititan agnoskon de via firma fideleco la graflandon de Esztergom.

Gedő: Sinjoro, mia reĝo, estu sufiĉa premio por mi, ke vi degnis memori min, kaj feliĉigu alian per via propono...

Tria sceno

La antaŭaj, Heleno, Géza, Ladislao

Heleno *(elpaŝinte el la tendo, per unu mano ŝi kondukas Géza, per la alia portas la du-trijaran Ladislaon... per rapidaj paŝoj ŝi iras al Adalberto, sidigas Ladislaon en lian sinon... volas paroli, sed estas tiom emociita, ke ŝi restas silenta)*.

Baját: Kio nun okazos?

Zsember: Kiel mi diris, li proklamigas Géza sia heredonto.

Baját: Sed kial la reĝedzino estas funebre vestita?

Zsember: Hazardo aŭ kaprico.

Baját. Tion mi ne kredas...

Zsember: Do kredu via moŝto kion ajn. Ni baldaŭ vidos.

Baját: Kiel bela virino!

Zsember: Ne eblas nei.

Heleno *(kun tremanta voĉo):* Hungaroj!

Ĉiuj: Ni aŭdu, ni aŭdu!

Heleno: Noblaj viroj! Mi ne dubas pri via fideleco, sed se mi dubus, nun vi povas doni pruvon pri tio, ĉu vi estas fideluloj de la reganto aŭ ne. De ĉi tiu bona reganto, kiun vi vidas ĉi tie, kaj kiu ne vidas vin. Li ne vidas vin, kiujn li tiom amas, li ne vidas min kaj siajn infanojn, kiujn li apenaŭ povas ami pli bone ol vin. Hungaroj, ĉu vi havis iam pli bonan reĝon ol Adalberto la 2a? Diru, ke jes! Kaj tiam mi ne plu parolos. Vi silentas, ĉar vi konsentas, vi devas konsenti. Kaj ĉu estis pli malfeliĉa reĝo de Hungario ol ĉi tiu, kiu estas unu de la plej bonaj? Jen la plej bona kaj la plej malfeliĉa reĝo; rigardu lin! Tamen ne, ne rigardu lin, ĉar en kiu estas nur tiom da kompato, kiel la plej malgranda rosoguto, ties koro krevos, vidante lin. Aŭ ĉu povas esti pli kompatiga vidaĵo, kiel ĉi tiu antaŭ viaj okuloj. Kreito de Dio, kiu vidas neniun kreiton de Dio, sur kiun la suno vane brilas, al kiu la steloj kaj liaj amatoj vane ridetas. Latronon, kiun la justico kondamnas al la plej profunda de la prizonoj, kelkfoje vizitas sunradieto, kiu rakontas dolĉajn aferojn pri la ekstera bela mondo; kaj ĉi tiu viro, kiu kulpis kontraŭ neniu, kiu estas senpeka kiel la plej eta nubo de maja aŭroro, antaŭ ĉi tiu viro ankaŭ tiu eta sunradio estas forfermita, kiu ŝteliras eĉ en la ĉelon de tiu latrono. Ho, senekzempla malindaĵo!

Pluraj voĉoj: Venĝo al la kulpintoj!

Heleno: Ha, noblaj viroj, ĉu do vere ne dormas viaj animoj? Mi aŭdas viajn voĉojn, mi volus vidi la entuziasmon sur viaj vizaĝoj, sed mi ne povas vidi, ĉar miaj larmoj nebuligas mian vidon. Kiel nun miaj larmoj

fluas, tiel fluu la sango de tiuj latronoj, kiuj ne hororis fifari ĉi tiun ĉielklaman kulpon antaŭ Dio kaj la leĝo.

Pluraj voĉoj: Venĝo, sanga venĝo!

Heleno: Jes, sanga venĝo! Ke eĉ en la utero de sia patrino ektremu tiu, kiu iam eĉ nur pensus fari tian agon. Sanga venĝo, por ke estonte ĉiu latrono malesperiĝu kaj elpiku la proprajn okulojn, antaŭ ol li aŭdacus tuŝi la personon de sia konsekrita reĝo. Estu ĉi tiu placo, kie nun ni staras, paĝo de nia historiolibro, sur kiu estu notite per sangaj literoj, kio atendas la majestolezantojn: estu ĉi tiu placo paĝo de nia historiolibro, sur kiu orlitere staru, ke la hungara nacio ne lasas sian reganton sen esti venĝita, ke la hungara estas tia nacio, pri kiu ĝiaj reĝoj povas fieri! La kulpuloj estas inter vi. Vi konas ilin. Ek do, kies glavo nun restos en sia ingo, al tiu Dio ne plu permesos povi kiam ajn eltiri ĝin por plenumo de kavaliraj agoj. Ek, kiu ne estas malkuraĝa aŭ ne estis komplico de tiuj latronoj, Ek!

Estiĝas ĝenerala konfuzo… ĉiuj eligas glavon… kelkaj fuĝas… aliaj kuregas post ili… iom post iom ĉiuj malaperas dekstre-maldekstre.

Adalberto *(dum la konfuzo):* Viroj, paco, paco! Demetu viajn glavojn, mi petas vin. Mi ordonas! Mi ordonas, la reĝo! Ĉu neniu obeas?

Kvara sceno

Adalberto, *Heleno*, *Géza*, *Ladislao*

Ekstere aŭdiĝas de tempo al tempo glavoklakado.

Adalberto: Ho, mia kunsortulino, kion vi faris?

Heleno: Kio estis mia sankta devo, kion mi promesis per ĵuro. Mi venĝis vin, mia edzo.

Adalberto: Vi altiris malbenon sur mian kapon, viajn infanojn kaj la hodiaŭan tagon.

Heleno: Mi altirus malbenon sur min mem, se mi ne estus farinta, je kio mi ĵuris.

Adalberto: Venu, venu kun mi, ni foriru de ĉi tiu loko. Ŝajnas al mi,

kvazaŭ mi vadus en sango, kiu nun estas verŝata, kaj kvazaŭ ĉiu ĝia guto estus serpento, kiu lasas en min siajn venenajn dentojn. Ho, Heleno, ĉu mi vidas pli nun ol antaŭe? Kaj iĝus al mi terure, se ĉi tiu venĝo estus malferminta miajn okulojn, por vidigi al mi ĉi tiun scenon! Ĉu vin skuas ploro? Ne malŝparu viajn larmojn, iam mi bezonos ilin... se mi mortos... ĉar miaj subuloj ne priploros min. *(Ĉiuj kvar eniras la tendon.)*

Kvina sceno

Prizono

Ŝimŝono, provoso venas de flanke.

Ŝimŝono: Ĉu nova ĉelo, ree malpli granda?

Provoso: Jes, sinjoro, kaj ĝi estas jam la lasta.

Ŝimŝono: Kaj tiu pordo? *(montras mezen.)*

Provoso: La komenco de la mondo. Tra ĝi vi iros en la brakojn de la libereco aŭ de la ekzekutisto.

Ŝimŝono: Kaj kiun vi antaŭvidas?

Provoso: Se la sorto nur tiel favoras vin kiel viajn kunulojn: mi kredas la lastan.

Ŝimŝono: Ĉu do ĉiuj falis mortaj?

Provoso: Ja neniel! Ĉiuj pendas.

Ŝimŝono: Pesto kaj damno! Bela konsolo. Kien vi ekiras, he?

Provoso: Eksteren, kiel vi vidas.

Ŝimŝono: Kion farendan vi havas ekstere?

Provoso: Nenion. Sed prefere mi rigardos la belan bluan ĉielon ol ĉi tiujn malhelajn, ŝimajn volbojn.

Ŝimŝono: Ĉu la ĉielon? Kio do estas la ĉielo? Kiel vi pensas?

Ŝimŝono: Kio estas la ĉielo? Kiu kio ĝin opinias.

Ŝimŝono: Kaj vi kio ĝin opinias?

Provoso: Mi, sinjoro, mi estas nur simplamensa homo, laŭ tio mi havas mian konfesion, kaj vi scias, religia homo rigardas ĝin la lando de la anĝeloj, kvankam la racio kontraŭdiras tion; nu, sed kie kredo regas, tie racio estas servisto, kiu devas silenti. Nu, do amuziĝu bone, sinjoro, ĉar mi lasas vin sola. *(For, ŝlosinte la pordon.)*

Sesa sceno

Ŝimŝono: Li ŝlosis ĝin! Se ankoraŭfoje ĝi malfermiĝos, ĉu ne la ekzekutisto venos tra ĝi? Ho, se li venus laŭeble plej baldaŭ, se li jam devas veni. Mi ne kredas fabelojn pri diabloj, infero transmondaj. Kaj kial propre estus tie infero? Ĉu fripono ne trasuferas la turmentojn de la eterna vivo de la ĉelo ĝis la eŝafodo? Ĉar mi estis fripono, kial nei, granda fripono. Al mi mem mi povas konfesi, aparte post kiam la tuta mondo scias tion. Kaj ĉi tiu penso estas varmega radio, kiu bruligas miajn tempiojn; ĉi tiu penso estas la sola lumo en mia ĉelo, sed lumo de fulmo, kiu blindigas, mortigas. Mi vidas terurajn figurojn apud ĉi tiu lumo, pri kiuj homo ankoraŭ ne sonĝis. Kaj dum mi vidas ĉi tiujn figurojn, sur mia vizaĝo frostiĝas la akvogutoj, kiuj falas sur ĝin de la volbo. Aŭ ĉu ili estas malvarmaj ŝviteroj de la teruro? Mi sentas teruron. Ho, se iu estus proksime al mi; ĉi tiu soleco estas teruregа.

Sepa sceno

Ŝimŝono, *Predslava*,
enveninta nerimarkate ĉirkaŭ la fino de la supra monologo.

Predslava: Jen mi estas, Ŝimŝono.

Ŝimŝono: Ha!

Predslava: Ĉu vi teruriĝis? Ne timu, mi venis konsoli vin en viaj lastaj horoj. Mi volis, ke vi ankoraŭfoje vidu min, antaŭ ol korvoj elfosos viajn okulojn; mi volis, ke ankoraŭfoje mi aŭdu vin paroli, antaŭ ol la ŝnuro de la ekzekutisto strangolos vian voĉon en la gorĝo. Ha, se li estus tion farinta antaŭ dudek kvin jaroj, kiam unuafoje vi mensogis, ke vi amas min, mizerulo! Tamen estus domaĝe. Nun mi ne povus venĝi min al vi, kvankam ĝi estas pli dolĉa, ol via amo estis. Mia venĝo havas

nur unu mankon. Oni pendumos kaj ne senkapigos vin. Kial vi ne estos senkapigita?! Mi tenus pokalon sub la sango, elŝprucanta el via kolo, por trinki el la sango de la patro por la sano de la filo! Vi estas vere indaj unu je la alia. Inda filo de Ŝimŝono estas Boriso. Sed al la filo, kiel al lia patro estas venĝite. Dio ne povis permesi, ke la filo tra jaroj turmentu senpune sian patrinon!

Ŝimŝono: Foriru, monstro!

Predslava: Ĉu monstro? Vi ambaŭ faris min tio. Ĉu mi foriru? Ne, mi volas plezuriĝi per via vidaĵo, ni ja amis nin, kaj ni jam ne povos longe vidi unu la alian. Kaj tion mi bedaŭras, ĉar mi rigardadus vin tra eterna vivo... tiel, kiel vi estas, ĉenita en fero, en naŭza ĉelo, kun pensoj pri la morto en via kapo. Ho, Ŝimŝono, kiel plezuriga vidaĵo por miaj okuloj! En mia ĝojo mi povus brakumi, kisi vin, kiel mi brakumis, kisis vin antaŭ dudek kvin jaroj. Ĉu vi memoras pri tiu tempo? Pri tiu tago?... Ho, tiu estis feliĉa tago, la plej feliĉa en mia vivo, escepte la hodiaŭan, hahaha! Nu, ĉu vi ne ĝojas? Ĉu vi ne ridas? Vidu, mi havas tre bonan humoron, hahaha!

Eĥo: Hahaha...

Predslava: Ĉu vi aŭdas? Ankaŭ la muroj ridas kun mi, nur vi ne ridas. Vi estas tre pala, blanka, kia mi estis, kiam reĝo Kolomano forpelis min de via flanko. Kio trafis vin? Ĉu vi timas la morton? Ne timu, ĝi ja venigos vin al viaspeculoj, al la diabloj. Mi volus scii, kiom da diabloj venos por via animo. Ĉar unu ne povos teni ĝin, tiom ŝarĝita ĝi estas per malicaĵoj. Se ili ne povos vin porti, ili voku min, mi plej ĝoje helpos al ili porti vian animon en la inferon.

Ŝimŝono: Kie ni certe revidos nin. Tie mi repagos mian ŝuldon.

Predslava: Ne, bona homo, vi ŝuldas al mi nenion. Mi estis via ŝuldanto, kaj dank' al Dio, mi repagis mian ŝuldon. Ho, se mi ne povus fari tion! Mi elfosus min el mia tombo, kaj venus al vi pagi, kion mi ŝuldas. Vidu, kiel konscienca ŝuldanto via mi estis!

Oka sceno

La antaŭaj, Saŭlo

Saŭlo *(al Predslava):* Ĉu vi ĉi tie?

Predslava: Mi konsolas la mortonton.

Saŭlo: Kion vi volas? Ĉu vivon aŭ morton?

Ŝimŝono: Kiun la filo volas doni al sia patro.

Saŭlo: Mi povas diri, ke vi estas mia patro. Ni ŝuldas nenion al la alia. Ni ne menciu la pasintecon, ĝi ne tre pledas por vi. Vi adoptis, plenkreskigis min, por poste forbati min kiel malbonan hundon.

Ŝimŝono: Mi tenis vin kiel adoptitan. Vi estas mia propra filo.

Saŭlo: Kio? Ĉu via filo? Ĉu via propra filo?

Ŝimŝono: Jes, mia efektiva filo.

Saŭlo: Ho, tiel do vi meritas la morton. Se patro traktas tiel sian propran infanon, kiel vi traktis min, tio estas senekzempla krueleco. Ne, mi ne kredas, ke mi estus via filo. Nun vi bezonas filajn sentojn, vi do kaptas ambaŭmane por la nomo patro. Kaj kiu estas mia patrino, se vi estas mia patro?

Ŝimŝono: Ŝi staras apud vi.

Predslava: Jes, Saŭlo, mi estas via patrino. Aŭ ĉu vi ne rimarkis de miaj brakumoj, ke nur patrino povas tiel varmege brakumi?!

Saŭlo: Kaj ĉu vi mia patrino?... Terure! Do la patrino komplicis kun la filo, por ke ili venĝu sin al la patro? Kial vi ne sciigis al mi, virino, se vi estis inicita en la sekreton?

Predslava: Tre simple. Ĉar mi bezonis vin, kaj se vi scius, kontraŭ kiu vi helpas min, vi eble retretus.

Saŭlo: Ho jes, mi retretus, certe. Virino, kiu faris vin tia diablo?

Predslava: Via patro kaj via frato.

Saŭlo: Ĉu mia frato? Ĉu do mi havas ankaŭ fraton?... Kaj kiu li estas?

Predslava: Boriso.

Saŭlo: Ha, ĉu do ĉiuj monstroj de la mondo estas miaj parencoj? Ĉu do tiel malnobla sango fluas en miaj vejnoj? Ho, honto, ne formordu la haŭton de mia vizaĝo! Ĉi tiuj estas miaj gepatroj, tiu mia frato. Mia menso ne forlasu min, mi ankoraŭ bezonas vin por tempeto!

Predslava: Filo, ĉu do ankaŭ vi ne amas min?

Saŭlo: Estas demandoj, al kiuj la plej bona respondo estas manko de respondo. Ŝimŝono, ne kiel filo al la patro, sed kiel juĝisto al la kulpulo mi parolas al vi. Ĉu vi bezonas vivon aŭ pendumilon? Vi povas elekti. Ĵuru, ke ĝismorte fidela subulo de reĝo Adalberto vi fariĝos, kaj vi estos libera.

Predslava: Kaj ĉu vi kredus lian ĵuron: Ĉu li ne ĵuris al mi…

Saŭlo: Hahaha, mia patrino avertas min, ne kredi la ĵuron de mia patro. Hahaha! Tre bele! Sed ŝi pravas, Ŝimŝono, mi ne kredas vian ĵuron kaj mi iam kriis: perdiĝu ĉiuj patrujperfiduloj! Do ili perdiĝu. Soldatoj! *(La ĉelpordo malfermiĝas, soldatoj aperas antaŭ ĝi.)* Haltu! Kion mi faru? Dio, donu lumon al mia menso, estas tiel obskure en ĝi, kvazaŭ ni jam estus post la tago de la lasta juĝo. Ĉu mi lasu lin vivi? Li ja estas patrujperfidulo! Ĉu mi donu lin en la manon de la ekzekutisto? Li ja estas mia patro. Ho! Provoso!

Provoso *(enpaŝas)*.

Saŭlo: Donu al mi vian glavon!

Provoso *(etendas sian glavon)*.

Saŭlo: Malligu la kaptiton!

Provoso *(liberigas Ŝimŝonon)*.

Saŭlo: Nun foriru kaj fermu post vi la pordon!

Provoso *(for)*

Saŭlo *(flanken):* Mi ne povas ekzekutigi mian patron, sed ankaŭ ne povas transvivi lian liberiĝon. La konscienco mortigus min. *(aŭdeble)* Ŝimŝono, jen al vi ĉi tiu glavo. Ni duelu, ĝis unu el ni mortos.

Ŝimŝono: Ha, brava filo, nobla-anima viro, ĉu vi volas dueli kun mi, ĉar

vi scias, ke vi ne havas egalan en skermado. Vi kompatas doni vian patron en la manon de la ekzekutisto, do vi mem murdos lin, ĉu?

Saŭlo: Movu ne vian langon sed vian brakon! Jen la glavo.

Ŝimŝono *(prenas la glavon… ili duelas… post tempeto):* Do ni nur ludas, ĉu? Vi nek atakas min, nek defendas vin…

Saŭlo: De komence mi povus forpreni de vi eĉ du vivojn. Vi povas vidi, mi atendas, ke vi mortigu min.

Ŝimŝono: Nu bone, se vi nur tion bezonas! *(Trapikas Saŭlon.)*

Saŭlo *(terenfalas)*.

Predslava *(kovras lin per sia korpo):* Saŭlo!

Saŭlo: Foriru, virino, foriru de mi, ne spiru peston sur min; mi ja ankaŭ sen tio jam mortos… aĥ! *(Mortas.)*

Ŝimŝono: Nu, Predslava, mia bela karulino…

Predslava: Ho, ankaŭ li ne amis min. Neniu amas min en ĉi tiu mondo!

Ŝimŝono: Pli frue vi ridis, nun jam mi ridas, hahaha!

Eĥo: Hahaha…

Ŝimŝono: Ĉu vi aŭdas? Ankaŭ la muroj ridas kun mi, nur vi ne ridas. Vi estas tre pala, blanka, kia mi estis, kiam reĝo Kolomano forpelis vin de sia flanko. Kio trafis vin? Ĉu vi timas la morton? Vidu, mi bone lernis, kion vi antaŭ nelonge diris al mi. Nu jes, la satano tiel helpas siajn fidelulojn kiel Dio. Mi vokis lin, kaj li aperis por mia savo kaj via pereo, karega mia. Vi diris, ke ni jam ne longe vidos nin. Vi devas pravi. Venu do en miajn brakojn, karega mia, venu! Vi estas ja la mia, sole la mia!

Naŭa sceno

La antaŭaj, Boriso

Boriso *(kiu dum la lastaj vortoj rapide enkuras.)* Ne la via. De ni ambaŭ. Mi trovis vin, eskapinta monaĥino, mi trovis vin, vi ne plu eskapos. Longe mi serĉis, sed fine mi trovis vin. Jen vi estas en mia mano!

Predslava: Estus pli bone, anstataŭ serĉi min, restadi en via tendaro. Ĝi ne estus malfideliĝinta al vi.

Boriso: Pri kio vi parolas?

Predslava: Pri tio, ke viaj fideluloj, via lando forlasis vin, ke vi ne plu havas tronon, nek kronon, Galicio ne bezonas vin, vi iĝis senhejmulo.

Boriso: Vi mensogas, babilema bazaristino!

Predslava: Kredu, ke mi mensogas. Tamen pro tio viaj partianoj reveturas al sia hejmlando, kien enpaŝi estas ne plu permesite al vi.

Boriso: Kaj de kie vi scias tion?

Predslava: Mi estis, kiu deŝiris vian maskon antaŭ via popolo. Mi estis, kiu ribeligis vian popolon kontraŭ vi. Mi estis la rimedo en la mano de la eterna justeco, kiu punas malbonajn infanojn, kiu puŝas misambiciulojn en vorticon.

Boriso: Ha, damno!... Tio estis via lasta vorto, vi mortos!

Predslava: Estus pli bone serĉi anstataŭ min vian edzinon, la unusolan estaĵon, kiun vi amas, kiel ofte vi diris.

Boriso: Kaj kie ŝi nun estas? Parolu, se vi scias, parolu! Mi perdis mian landon, vi forrabis ĝin de mi; sed mi pardonas, nur diru, kie estas mia edzino, mia amata edzino!

Predslava: Via amata edzino de tiam pasas trans landoj kun sia amatino Milutin, via servisto. Mi eskapigis ilin!

Boriso: Nun jam vi devas morti! Nun jam mi mortigos vin!

Ŝimŝono: Haltu! Mortigos ŝin mi!

Predslava: Ĉu mortigos min vi? *(Subite kaptas la glavon da Saŭlo kaj*

trapikas Ŝimŝonon.)

Ŝimŝono: Ho, ĉi tiu ne estas virino, nek diablo, ŝi pli grandas ol ni du! *(Mortas.)*

Predslava, Boriso *(kun glavo en la mano rigide ili kontraŭstaras).*

Predslava *(post paŭzo):* Ĉu vi vidas la sangon sur ĉi tiu glavo? La sango de via patro. Proksimiĝu, mi vidu: kies estas pli nigra, ĉu la lia aŭ la via? *(La kurteno neatendite falas.)*

FINO

Sándor Petőfi (1823-1849): poeto, demokrato, respublikano, revoluciulo, patrioto, unu el la plej konataj kaj ŝatataj figuroj de la hungara poezio. Dum sia peripetia vivo li estis aktoro, soldato, redaktoro, adjutanto de generalo Bem. Li malaperis post la batalo en Segesvár (Sighișoara, nun en Rumanio). Lia lingvaĵo estas simpla, tiu de la popolo. Li portis al perfekteco la hungaran romantikismon. Enigis novajn temojn en la hungaran lirikon: familion, geedzan amon, vivon de la popolo, altiriĝon al la ebenaĵa pejzaĝo.

Li estis ĉefe poeto, sed verkis ankaŭ novelojn, vojaĝpriskribojn, teatraĵojn. Lia dramo *Tigro kaj hieno* rekondukas nin en la 12a-jarcentan Hungarion, kie la „tigro”, la bastarda Boriso volas akiri la tronon, depuŝi la blindan reĝon Adalberto la 2a, dum kio li konfrontiĝas kun la „hieno”, sia patrino, la eksreĝino Predslava, sia frato Saŭlo kaj sia patro Ŝimŝono.

* * *

Saŭlo: *...Ŝimŝono, ne kiel filo al sia patro, sed kiel juĝisto al la kulpulo mi parolas al vi. Ĉu vi bezonas vivon aŭ pendumilon? Vi povas elekti. Ĵuru, ke ĝismorte fidela subulo de reĝo Adalberto vi fariĝos, kaj vi estos libera.*

***Predslava**: Kaj ĉu vi kredus lian ĵuron: Ĉu li ne ĵuris al mi...*

***Saŭlo**: Hahaha, mia patrino avertas min, ke mi ne kredu la ĵuron de mia patro. Hahaha! Tre bele! Sed ŝi pravas, Ŝimŝono, mi ne kredas vian ĵuron kaj mi iam kriis: perdiĝu ĉiuj patrujperfiduloj! Do li perdiĝu. Soldatoj!* (La ĉelpordo malfermiĝas, soldatoj aperas antaŭ ĝi.) *Haltu! Kion mi faru? Dio, donu lumon al mia menso, estas tiel obskure en ĝi, kvazaŭ ni jam estus post la tago de la lasta juĝo. Ĉu mi lasu lin vivi? Li ja estas patrujperfidulo! Ĉu mi donu lin en la manon de la ekzekutisto? Li ja estas mia patro. Ho! Provoso!*

***Provoso** (enpaŝas).*

***Saŭlo**: Donu al mi vian glavon!*

***Provoso** (etendas sian glavon).*

***Saŭlo**: Malligu la kaptiton!*

***Provoso** (liberigas Ŝimŝonon).*

***Saŭlo**: Nun foriru kaj fermu post vi la pordon!*